# 107-a Universala Kongreso de Esperanto

Montrealo, 6 – 13 aŭgusto 2022

# KONGRESA LIBRO



KONGRESA TEMO

## Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj

107-a Universala Kongreso de Esperanto

Montrealo, 6 – 13 aŭgusto 2022

# KONGRESA LIBRO

KONGRESA TEMO

## Lingvo, vivo, tero:
## Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj

**Cifereca PDF-versio** de la Kongresa Libro

Tio ĉi estas la cifereca versio de la Kongresa Libro,
por la *107-a Universala Kongreso de Esperanto* en Montrealo.
Ĝi ne enhavas la liston de partoprenantoj.
Tiu haveblas tamen en la papera versio, kiun ricevas ĉiu aliĝinta kongresano en la akceptejo dum la UK.
Tiu ĉi versio de la Kongresa Libro celas prezenti la enhavon de la 107-a UK al potencialaj interesiĝantoj.

© Universala Esperanto-Asocio, 2022
ISSN 0083-3851
Redaktoro: Dorota Rodzianko kaj Peter Baláž
Provlegado: Rob Moerbeek
Enpaĝigo: Daria Slonova
Kompostita kaj enpaĝigita en E@I

Titolpaĝo: Tourisme Montréal (https://dam.mtl.org/)

# Enhavo

Mesaĝo de la Alta Protektanto ... 4
Mesaĝo de la Urbestrino ... 5
Honora Komitato ... 6
Estraro de UEA ... 7
Oficistoj ... 7
Kongresa Fako ... 7
Loka Kongresa Komitato ... 8
La kongresejo ... 9
Utilaj informoj pri Montrealo ... 12
Kongresaj salonoj ... 14
Laŭtaga programo ... 17
Tabela programo ... 22
Alfabeta listo de la programeroj ... 29
Eta ABC de la kongresano ... 35
Giĉetoj ... 36
Kongresa Temo ... 37
La libroj ... 38
Unuafojaj kongresanoj ... 39
Movada Foiro ... 39
Informado kaj komunikado ... 40
KOVIM-19 ... 41
Kleriga lundo ... 42
Kunsidoj de UEA-instancoj ... 43
Prelegoj pri Kanado ... 45
Lingvaj kursoj ... 46
Prelegoj Ĝeneralaj ... 47
Ekumena Diservo ... 50
Lingvaj kursoj kaj ekzamenoj ... 50
Esperantologia Konferenco ... 52
Kongresa Aŭkcio ... 53
Tago de Lernado ... 54
Internacia Kongresa Universitato ... 55
Scienca Kafejo ... 62
Junulara Programo ... 63
Artaj aranĝoj ... 64
Efemera Artgalerio kaj Bobelarto ... 70
Sinceran dankon! ... 73
Universalaj Kongresoj de Esperanto ... 74
La Espero ... 76

# Mesaĝo de la Alta Protektanto



**Georges Sioui**

Karaj kongresanoj,

La bonvenigo, kiun mi ricevis kadre de ĉi tiu grava Kongreso donas al mi fortan senton de honoro kaj dankemo, kiun sentos mia hurona-ŭendata nacio kaj ĉiuj aliaj indiĝenaj nacioj tra la mondo. Certe estas, ke la "Esperantista spirito" estas esence sama kiel la "granda cirkla spirito", pri kiu parolas ĉiuj indiĝenoj de la mondo. Unu el miaj profundaj deziroj, intuicie dividitaj, mi scias, de ĉiuj esperantistoj, estas, ke ni homoj malkovru la simplajn sekretojn, kiuj ebligas al ni aliri unu la alian kaj kompreni, ke preter niaj malsamoj (cetere, aferoj admirindaj, prefere ol simplece akceptindaj), ni estas "ni", familio; simplajn sekretojn, kiuj ebligas al mi vidi vin kaj nomi vin mia frato, mia fratino, mia onklo, mia onklino, mia avo, mia avino, mia parenco, mia familio. Esperantistoj estas inter la homoj, kiuj ekde la plej longa tempo marŝas laŭ ĉi tiu vojo. Karaj Esperantaj parencoj, mi amas vin, admiras vin kaj dankas al vi pro la loko, kiun mi havas inter vi, kun vi.

Georges Sioui

**Biografio** de Georges Sioui

Georges Sioui estas hurona-ŭendata historiisto. Post klasikaj studoj en Kebekio kaj Nov-Skotio, li doktoriĝis en la Universitato Laval (urbo Kebeko) en 1991. Li estis ĉefredaktisto de la magazinoj *Kanatha* kaj *Tawow*, kaj verkis kvar gravajn librojn pri historio kaj indiĝena filozofio. Georges Sioui ankaŭ estas plurlingvulo, aktivulo, poeto, eseisto kaj komponisto. Li estas internacie agnoskata prelegisto pri indiĝenaj historio, filozofio, spiriteco kaj edukado. Li estas emerita profesoro de la Fakultato pri artoj de la Universitato de Otavo.

**Ridetĉasistoj** (poemo de Georges Sioui)

Vi kaj mi,  
tutaj fremduloj, kiuj  
neniam plu revidos unu la alian  
krom en ĉi tiu fuĝema momento.  
Miaj ĉasemaj okuloj serĉas la viajn.  
Mi kaptas vian rideton!  
Kia ĝuinda delico por mia animo!  
Mia koro kantas sian plej belan,  
sian plej feliĉan kanton,  
via animo prenas min en siajn brakojn,  
ĉirkaŭbrakumas min, kuracas tutan mian  
estaĵon. Ni estas ok miliardoj,  
Neniam mankos manĝaĵoj al mi,  
mi estas ridetĉasisto.

# Mesaĝo de la Urbestrino



Foto: Ville de Montréal, **Sylvain Légaré**

En la estraro de la urbo Montrealo, ni kredas, ke gravegas doni al ĉiuj voĉon. Tial ni engaĝiĝas tiel, ke nia urbo fariĝu loko bonvenigema kaj inkluzivema, kie ĉiu homo povu flori plene, siamaniere.

La malfermecaj, bonvenigaj kaj engaĝiĝaj valoroj de la Universala Kongreso de Esperanto spegulas tiujn de Montrealo. Estas do honorego bonvenigi vin en Montrealo.

Montrealo estas metropolo, kie kunvivas diverslingvaj kaj diverskulturaj homoj. Tiu mikseco estas forto por Montrealo. Tiukunteksté, la proksimiĝo inter kulturoj celata de Esperanto trafas la zorgojn kaj valorojn de nia estraro.

Mi cetere ŝatus reliefigi la rolon de via organizo cele al la kreado de pontoj inter multaj kulturoj kaj al pli harmonia komunikado inter popoloj.

Kreita en 1887 de Ludoviko L. Zamenhof, Esperanto estas unuiga kaj inkluziva lingvo. Ĝi travivis du mondmilitojn, aldone al persekutaj epizodoj celintaj Esperantistojn, kaj daŭre estas parolata pli ol 130 jarojn poste. Temas pri impresa rezistemo kaj pri nemalpravigebla pruvo, ke unuiĝo estigas forton.

Gratulon al la organizantoj pro la okazigo de tiu ĉi kongreso, kiu kunigos, en Montrealo, partoprenantojn de ĉiuj mondopartoj. Mi invitas vin dediĉi tempon por malkovri nian urbon kaj ĝui ĝiajn multnombrajn allogaĵojn.

Bonvenon!

Valérie Plante
Urbestrino de Montrealo



Montréal

# Honora Komitato

**Bïa Krieger (Bïa)** — Kantistino
Bïa estas brazildevena kantistino aktiva en Francio kaj Kebekio, kiu kantas en la portugala, franca, hispana kaj itala. Ŝi kreis plurajn muzikalbumojn kaj ankaŭ verkis romanon. En 2021, ŝi estis nomumita Kavaliro de la Ordeno de la artoj kaj de la literaturo de Francio.

**Hassane Amraoui (Chlag)** — Artisto
Origine el Aŭrezo, en Alĝerio, Chlag loĝas en Montrealo ekde 2005. Li studis en Batna kaj Alĝero. Li prezentis siajn artaĵojn en pluraj gravaj tuniziaj kaj alĝeriaj galerioj, kaj internacie. Li estas membro de la organizo “Diversité artistique Montréal” kaj partoprenas en diversaj urbaj kulturaj projektoj.

**Yves Desrosiers** — Muzikisto
Kebekia muzikisto, komponisto kaj kantisto, kiu karieris kaj kunlabore kaj sole, en Kanado kaj internacie. Inter gravaj projektoj, lia lasta albumo “Nokta ŝoforo” uzas Esperanton.

**André Dudemaine** — Filmfaristo, kunfondinto de indiĝenaj revuo kaj festivalo
André Dudemaine estas premiita inua filmfaristo kaj kultura aktivulo kun bunta kariero. Li kunfondis la gravan kulturan organizon “Terres en vue”, respondeca interalie pri indiĝena festivalo en Montrealo.

**Claudia Larochelle** — Ĵurnalisto kaj verkisto
Ĵurnalisto kaj verkisto, kiu gvidadis diversajn literaturajn elsendojn televide kaj radie, kaj ankaŭ verkas tekstojn kaj kronikojn por la gazetaro. Ŝi ankaŭ verkis novelojn, romanojn, literaturan eseon kaj librojn por infanoj. Ŝi loĝas en Montrealo.

**Jean-Benoît Nadeau** — Ĵurnalisto kaj verkisto
Ĵurnalisto kaj verkisto, kiu kontribuas al kebekiaj gazetoj per lingvaj kaj alitemaj kronikoj. Li ankaŭ verkis plurajn librojn pri lingvo kaj kulturo, sole aŭ kun sia edzino Julie Barlow. Lia laboro estis premiita per du dekduoj da ĵurnalismaj aŭ literaturaj premioj.

**Matthew Rankin** — Filmfaristo
Origine el Vinipego, Matthew Rankin estas kebekia filmfaristo. Li prezentis siajn verkojn en la filmfestivaloj de Berlino, Toronto, Sundance kaj en la Semajno pri Recenzado de Cannes. Li partoprenis en la 98-a UK en Rejkjaviko.

# Estraro de UEA



**Duncan Charters**
Prezidanto



**Fernando Maia Jr.**
Vicprezidanto



**Huang Yinbao**
Vicprezidanto



**Aleks Kadar**
Ĝenerala Sekretario



**So Jinsu**
Estrarano



**Jérémie Sabiyumva**
Estrarano



**Orlando E. Raola**
Estrarano



**Amri Wandel**
Estrarano

# Oficistoj



**Martin Schäffer**
Ĝenerala Direktoro



**Ionel Oneţ**
Libroservo



**Ralph Schmeits**
UEA-kasisto

# Kongresa Fako



**Dorota Rodzianko**



**Peter Baláž**



**Sonja Zaretskaia**

# Loka Kongresa Komitato



**Normand Fleury**
Prezidanto



**Nicolas Viau**
Vic-prezidanto, eksteraj rilatoj



**Joel Amis**
Vic-prezidanto



**Garry Evans**
Kasisto



**Ĵenja Amis**
Komunikado, sekretario



**Zdravka Metz**
Ekskursoj, volontuloj, IIK



**Bob Williamson**
Administrado



**Sylvain Auclair**
Tradukado, Kongresa Kuriero



**Camille-Amélie Koziej Lévesque**
Junulara programo



**Linda Le Nepveu**
Koncertoj kaj arto

**Aliaj:**



**Wally du Temple**
Honora prezidanto

# La kongresejo

Nia kongresejo estas la Universitato de Kebekio en Montrealo (Université du Québec à Montréal) — UQAM. Ĉiuj prelegoj okazos en la ĉefa konstruaĵo DS, krom la koncertoj, bankedo / balo, la Movada Foiro. Interaga mapo de ĉiuj pavilonoj de UQAM: https://plancampus.uqam.ca.

La kongresejo funkcias de 7:30 al 22:00 de lundo ĝis ĵaŭdo kaj 8:00 al 18:00 de vendredo, sabato kaj dimanĉo. Estos foje plilongigita horaro. **Grave: la kongresejo estas fermita en merkredo.**

**Ĉefa konstruaĵo**

La ĉefa kongresejo estas UQAM: Universitato de Kebekio en Montrealo (Université du Québec à Montréal), konstruaĵo J.-A.-DeSève (mallongigo: DS; prononco: desev'; adreso: 320, rue Sainte-Catherine Est, Montréal, H2X 1L7, metrostacio Berri-UQAM). Se vi alvenas per la metroo, vi ne devas eliri eksteren — vi povas piediri ĝis la kongresejo per la tunelo de la metrostacio Berri-UQAM. Parto de tiu ĉi koridoro estas la loko, kie okazos la Movada Foiro (Agora). Estas kelkaj elirejoj/enirejoj en tiu ĉi metrostacio. Iru ĝis la supra nivelo en la metroo kaj direktu vin al la enirejo "UQAM". Iru laŭ la koridoro rekte kaj sekvu indikojn al la pavilono "DS". Supreniĝu per la eskalatoro supren de la nivelo "M" (metroo) unu nivelon. Teretaĝe (nivelo "R") troviĝas en la halo Benczik: akceptejo, informejo, giĉetoj kaj budoj. Aldone tie estas la salonoj: *Lapenna, Nourmont, Solis, Milojevič* (Kongresa Kuriero kaj LKK-ĉambro). Antaŭ la eniro troviĝas la *korto Harmon* (spaco de la komuna foto). Mapo de la konstruaĵo: https://plancampus.uqam.ca/pavillon-ds.



En la unua etaĝo troviĝas la *Libroservo* (*Eichholz)* kaj salonoj: *Beauchemin, Hodler, Nanovfszky, Saint-Martin* kaj *Zaleski-Zamenhof.*




En la dua etaĝo troviĝas la salonoj *Tišljar* kaj *Horst-Kolińska*, kie okazos KER-ekzamenoj.

**Parkado**

Vi povas parki vian aŭton en la parkejo de la ĉefa konstruaĵo (DS) — je la flanko de la strato Christin. La kosto estas 14 dolaroj tage.

**Movada Foiro**

La Movada Foiro okazos en la halo *Durette* - loka nomo "Agora" (la granda malferma halo), UQAM-konstruaĵo Judith-Jasmin (mallongigo: J; prononco: ĵudit-ĵasmen, metrostacio Berri-UQAM). Tiu konstruaĵo estas subtere ligita al la kongresejo (320, rue Sainte-Catherine Est). Se vi alvenas per la metroo, simple eniru la enirejon de la universitato (serĉu grandajn literojn UQAM apud la pordo) kaj piediru rekte ĝis Agora. Distanco: 3 minutoj piede de la ĉefa kongresejo. La Movada Foiro okazos sabate, la 6-an de aŭgusto 2022, 19:00 - 21:00.


**Teatro (Salono Zamenhof)**

Salono Zamenhof, kie okazas la Solena Inaŭguro, Solena Fermo kaj la vesperaj programeroj (koncertoj, teatraĵo) troviĝas en teatro Cinéma Impérial, 1430, rue de Bleury, Montréal, H3A 2J1. Teatro Cinéma Impérial situas 12 minutojn piede de la kongresejo (950 m). Eliru el la ĉefa kongresejo al la elirejo sur la straton Sainte-Catherine. Iru okcidenten (maldekstren) — en la direkto de Place des Arts laŭ la strato Sainte-

Catherine ĝis la strato De Bleury. Kiam vi atingos De Bleury, turniĝu dekstren. Se vi venas per la metroo, iru ĝis la stacio Place des Arts (elirejo De Bleury).

**Bankedo, Balo, Akcepto de SZ**

La Bankedo, Kongresa Balo kaj ankaŭ la Akcepto de Societo Zamenhof okazas en Hotelo Hyatt Place, 1415, rue Saint-Hubert, Montréal, H2L 3Y9. Hotelo Hyatt situas 5 minutojn piede de la kongresejo. Eliru el la ĉefa kongresejo al la elirejo sur la straton Sainte-Catherine. Iru orienten (dekstren). La hotelo bone videblas de la kongresejo kaj situas ĉ. 400 metrojn for de ĝi. Se vi venas per la metroo, eliru el la elirejo "Rue Berri" (Strato Berri).



# Utilaj informoj pri Montrealo

**Lingvoj.** La franca kaj la angla estas la oficialaj lingvoj de Kanado, la franca estas tiu de Kebekio, la plej vasta provinco de Kanado, kaj la sola ĉefe franclingva. Kvankam la franca estas la ĉefa lingvo de Montrealo, ankaŭ estas signifa anglalingva loĝantaro. Surstrate krome aŭdeblas i.a. la araba, la hispana, la itala, la haitikreola. En Montrealo la plimulto de la homoj regas ambaŭ lingvojn: la francan kaj la anglan (pli ol en iu ajn alia kanada urbo). El la indiĝenaj lingvoj iuj estas daŭre uzataj, je diversaj gradoj.

**Loka tempo.** UTC - 4:00 (somere).

**Mono.** La loka mono estas la kanada dolaro (CAD).

Moneroj: 5, 10, 25 cendoj kaj 1 kaj 2 dolaroj.

Biletoj: 5, 10, 20, 50 kaj 100. La biletoj havas la saman grandecon sed malsamajn kolorojn. Eblas ŝanĝi monon en la flughavenoj, bankoj kaj en multaj privataj monŝanĝejoj urbocentre. Bankoj ĝenerale estas malfermitaj dumsemajne de la 10:00 ĝis la 15:00.

Monmaŝinoj (guichet automatique – ATM), kiuj akceptas la ĉefajn kreditkartojn, facile troveblas en multaj lokoj.

Plej granda parto de la vendejoj kaj restoracioj akceptas kreditkartojn Visa kaj Mastercard (kaj ankaŭ ofte American Express) kaj debetkartojn de la kanada banka reto Interac. Se vi venas el alia lando, vi devos uzi kontantan monon aŭ kreditkarton.

Kvankam samnomaj, la kanada dolaro kaj la usona dolaro estas du malsamaj valutoj. La kanada dolaro kutime valoras inter 0,70 kaj 0,80 USD.

**Elektro.** La elektra tensio estas 110-volta, kun frekvenco de 60 hercoj. La surmuraj konektilingoj akceptas konektilojn kun du plataj stiftoj aŭ kun du plataj kaj unu ronda stiftoj.

**Telefonado**. La prefikso por telefoni al Kanado de eksterlando estas +1. Por telefoni de Kanado al eksterlando: 011 + landa kodo + telefonnumero. Grava numero: 911 por polico, fajrobrigado kaj urĝa medicina helpo.

**Interreto.** En pluraj hoteloj, restoracioj, kafejoj, aliaj komercejoj haveblas senpagaj retkonektoj.

**Medikamentoj.** Se vi uzas preskribitan medikamenton, bv. kunporti la kuracistan recepton, skribitan preferinde france aŭ angle. Estas pluraj apotekoj en la urbo. Iuj funkcias eĉ nokte.

**Tabako, alkoholo, kanabo (mariĥuano)**

La reguloj pri aĉetado kaj konsumado de tiaj substancoj varias laŭ provincoj en Kanado. En Kebekio necesas aĝi almenaŭ 18 jarojn por aĉeti ilin (21 jarojn por kanabo). Fumado estas malpermesita en publikaj internaj lokoj kaj apud ili, inkluzive de la kongresejo. Kanabo-produktoj leĝe aĉeteblas nur en malmultaj registaraj vendejoj kaj fumado estas malpermesita en publikaj lokoj.

**Sanservo**

Konsilinde, ke kongresanoj havu sanasekuron por la daŭro de la vojaĝoj plus restado.

**Trinkakvo.** La kranakvo estas ĉie trinkebla, krom se alie indikite.

**Aĉetimposto.** La afiŝitaj prezoj kutime ne inkluzivas imposton. Por plej multaj varoj (sed ne bazaj manĝaĵoj, kiel ekzemple pano, lakto, fruktoj, legomoj), necesas aldoni ĉ. 15 procentojn al la prezo. Por neperiodaj libroj, la imposto estas 5-procenta.

Same, la prezoj en la menuoj kutime ne inkluzivas imposton. Do, bonvolu memori ke oni aldonos ĉ. 15 procentojn al via fakturo. En trinkejoj, je aĉeto de alkoholaĵo, aldoniĝos imposto.

**Trinkmono.** La trinkmono en restoracioj kaj taksioj ne estas inkluzivigita en la fakturo, sed estas atendata, minimume je 15% de la aĉetita servo. Oni ne donas trinkmonon nur se la serv(ad)o estis vere malbona. Ofte eblas ankaŭ doni trinkmonon per elektronika pago, ne nur per kontanta mono.

**Enurba trafiko.** La individua bileto por la publikaj transportoj kostas 3,50 CAD kaj ebligas unudirektan seninterrompan iradon en ĉiuj metrooj kaj publikaj busoj de Montrealo, dum maksimume 120 minutoj. Per tiu bileto eblas eniri la metroan reton nur unufoje.

En la busoj la biletoj aĉeteblas per moneroj kaj ne eblas ricevi monon se vi tro pagis. En la metrostacioj eblas aĉeti biletojn kaj el aŭtomatoj kaj el giĉetoj.

**OPUS-Karto**

En la sesdolara karto OPUS, eblas enmeti diversajn vojaĝbiletojn: i.a. tuttagan, tritagan kaj semajnan biletojn. Por la kongresanoj la plej konvena eble estas la semajna bileto, kiu senlime validas de la lunda mateno ĝis la dimanĉa verspero kontraŭ 29 CAD. 10 individuaj biletoj kostas 31,50 CAD.

**Sekureco**

Kanado estas ĝenerale tre sekura lando sed, kiel ĉie, estu atentema pri dokumentoj, valoraĵoj, mono ktp. La krima nivelo estas malalta kaj oni povas sekure promeni nokte.

**Trovi vian etaĝon**

Plejofte, la teretaĝo estas indikita per stelo — aŭ litero “R” (rez-de-chaussée). La unua etaĝo estas unu nivelon super la teretaĝo, ktp.

**Memgvida Ekskurso en Malnova Montrealo**

Se vi ŝatus memstare viziti la historian kvartalon de Montrealo ĉe la haveno, simple petu priskriban tekston ĉe la kongresa informejo. Vi ankaŭ povas elŝuti ĝin de la reto: https://esperanto2022.ca/eo/ekskursu/. Sampaĝe troviĝas informoj pri vegetaraj manĝejoj, tipaj montrealaj pladoj kaj aliaj memgvidaj ekskursoj.

**Mapo de Montrealo kun klarigoj en Esperanto**

Uzu tiun ĉi mapon en Esperanto, kun ĉefaj vidindaĵoj en Montrealo kaj ankaŭ indiko pri la kongresejo, teatro kaj hotelo Hyatt. Vi ankaŭ povas elŝuti tiun ĉi mapon en la formato KML aŭ KMZ kaj instali sur vian mapan apon por uzi sen la reto.

https://mallonge.net/mapo2022

# Kongresaj salonoj

**Pierre BEAUCHEMIN** (1869-1952)
Franc-kanada stenografisto, kiu lernis Esperanton de Pastro Solis. Li estas unu el la pioniroj de Esperanto en Kanado. Li instruis Esperanton kaj en 1901 kunfondis la E-rondeton Progreso. Li ankaŭ kunfondis kun Pastro Solis la revueton *L'espérantiste canadien*, kaj poste *La Lumo* kun Albert Saint-Martin. Li estis unu el la plej aktivaj esperantistoj en Kebekio kaj Nord-Ameriko ĝenerale. En 1901 Beauchemin daŭrigis la komencitan informadon pere de la loka gazetaro. Pierre Beauchemin ĉeestis la unuan UK-on en Boulogne-sur-mer kaj estis nomumita membro de la Lingva Komitato.

**Vilmos BENCZIK** (1945-2021)
Hungaro, pedagogo. Li grave kontribuis al la Esperanto-kulturo, per verkado kaj tradukado kaj per redaktora kaj eldonista laboroj. Estrarano de HEA, inter 1990 kaj 1992 - ĝia prezidanto. Ekde 2001 - membro de la Akademio de Esperanto. Prezidanto de la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA (1986–2002), Honora Membro de UEA.

**Frato Paul DURETTE** (1900-1972)
Franc-kanada religia frato, emeritiĝis en 1961 kaj tiam eklernis Esperanton. Kiam fondiĝis Montreala Esperanto-Klubo (MEK) en 1962, Paul Durette estis la unua kasisto; en 1966 li estis la unua, kiu oficiale ekzameniĝis kaj ricevis la diplomon por instrui E-kurson. En 1967 li preparis predikon por Onil Perrier, kiu legis ĝin kaj celebris la unuan Esperantan meson en Montrealo. Kiel kursgvidanto li preparis la instrulibron *Praktika Esperanto*, li ankaŭ tradukis multajn rakontojn el la kanada literaturo. Honora prezidanto de MEK de 1971.

**Rüdiger EICHHOLZ** (1922-2000)
Germano laŭnaske, en 1953 li migris al Kanado. En 1959 li malfermis sian domon kiel kulturcentron por esperantistoj. Pasia kunlaboranto de KEA, Honora Membro de 1995. Per sia Esperanto Press, Eichholz presis revuojn de KEA, siajn porinfanajn tradukojn, broŝuron pri Unitariismo kaj diversajn librojn en kaj pri Esperanto. Ano de la Akademio de Esperanto ekde 1976, li estris la sekcion pri teknikaj/fakaj vortaroj. Surbaze de sia kolekto de sonbendaj registraĵoj, en 1957 li fondis la Magnetofonan Servon de UEA kaj restis ties komisiito ĝis 1991.

**William R. HARMON** (1927-2019)
Usona esperantisto. Kunfondis Esperanto-klubon en Long Beach, Kalifornio. Aktiva en la Usona nacia organizo ELNA tuj post ĝia komenco en 1952, Honora Membro de UEA ekde 1992 kaj ĉefdelegito de UEA en Usono ekde 1987. Ofte servis kiel interpretisto en esperantistaj vojaĝgrupoj kaj ĉe publikaj prezentadoj.

**Hector HODLER** (1887-1920)
Sviso, filo de la pentristo Ferdinand Hodler. Esperantistiĝis kiel 13-jarulo. En 1908 li fondis UEA kaj dum 13 jaroj redaktis la revuon *Esperanto*, kiu plu restas la gvida movada periodaĵo. Dum la Unua Mondmilito li organizis servon de UEA por militkaptitoj kaj iliaj familioj.

**Mila van der HORST-KOLIŃSKA** (1927-2019)
Honora Membro de UEA, dumviva membro de Pola Esperanto-Asocio (PEA). Aktive organizis kaj gvidis kursojn laŭ la aŭdvida metodo de Tibor kaj A. Sekelj. Direkciano de la Instituto por Oficialigo de Esperanto (1966-72). Ŝi laboris en la Internacia Esperanto-Instituto (1978-98), precipe por profesiigo de Cseh-metodaj instruistoj kaj modernigo de la Cseh-materialo per aldono de metodikaj konsiloj por instruantoj. Realigis la videokurson *Mazi en Gondolando* (1995).

**Ivo LAPENNA** (1909-1987)
La plej granda organiza figuro de la Movado. Renoma fakulo de la internacia juro. Konstruinto de la moderna UEA, unue kiel ĝenerala sekretario, poste kiel prezidanto. Granda oratoro. Ĉefaj verkoj: *Retoriko* (1950) kaj *Esperanto en perspektivo* (ĉefredaktoro, 1974).

**Simo MILOJEVIĆ** (1936-2022)
Eksa Ĝenerala Direktoro de UEA, Honora Membro de UEA. Redaktis la revuojn *Kontakto* kaj *Esperanto*. Inter 1974 ĝis 1980 li estis Vicdirektoro, Ĝenerala Direktoro ekde 1983 ĝis 1995. Membro de la Akademio de Esperanto. En 1996, li decidis formeti ĉiujn movadajn funkciojn kaj laboris kiel libroservisto kaj bibliotekisto en UEA. En 2006 li ricevis la "esperantistan pacpremion" Deguĉi.

**György NANOVFSZKY** (1942-2021)
Honora Prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, Honora Membro de UEA. Profesoro kaj membro en la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, altranga ŝtatoficisto en la Hungara Registaro, en UN kaj en multaj aliaj internaciaj organizaĵoj kaj Ambasadoro de Hungario en ses landoj.

**Claude NOURMONT** (1945-2022)
Francino, dumviva Membro de UEA, konstanta Membro de Societo Zamenhof, Honora Prezidanto de TEJO. Ĝenerala sekretario kaj poste prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE; nun Espéranto-France). Ŝi estis Komitatano kaj Vicprezidanto de UEA. Redaktoro de *Monato* (rubriko Arto, 2005-2022), ĉefredaktoro de *Le Monde de l'Espéranto* (2003-2022) kaj konstanta prizorganto de la Kleriga Lundo dum la UK.

**Albert SAINT-MARTIN** (1865-1947)

Franc-kanadano kaj stenografisto de Montrealo. Li rapide lernis Esperanton en 1902 kaj tuj instruis ĝin, ĉefe en Montrealo. Li multe verkis en *La Lumo* sub la nomo Albert Fréderic Rembert. Kun siaj du infanoj, li ĉeestis la unuan UK-on en Boulogne-sur-Mer. Li fondis Laboristan Partion kaj en 1907 kunfondis la Esperantan Kooperativon por helpi malriĉajn laboristojn kaj senlaborulojn. Li prelegis, instruis Esperanton kaj fondis eldonejon. En 1925 li kunlaboris pri la fondo de franclingva Laborista Universitato.

**François-Xavier-Isaïe SOLY (SOLIS)** (1832-1903)

Franc-kanadano, katolika pastro. La unua esperantisto en Kanado kaj verŝajne Norda Ameriko farinta pioniran laboron, publike defendis Esperanton. Li publikigis en la ĵurnalo *Le Courrier de Saint-Hyacinthe* serion da artikoloj pri la lingvo. Li tradukis, instruis la lingvon, kreis E-rondon, kunfondis sub lia prezidado en Montrealo la unuan grupon, Klubo Progreso, en 1901. Fondis la revuon *L'espérantiste canadien*, kiu estis ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla kaj la franca.

**Zlatko TIŠLJAR** (1945-2020)

Kroata esperantisto. Prezidanto de Jugoslavia Junulara Esperantista Asocio 1968-1977 kaj membro de la komitato de TEJO. Ekde 2005 ĝis 2020 ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio. Instruisto, li gvidis pli ol 100 kursojn porkomencantajn kaj kelkajn daŭrigajn. Li verkis plurajn sciencajn verkojn pri lingvistiko kaj pedagogio. Konata inter esperantistoj kiel Pajo, li multe vojaĝis kaj prelegis pri Esperantaj kaj eŭropaj temoj.

**Louis-Christophe ZALESKI-ZAMENHOF** (1925-2019)

Doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, nepo de L. L. Zamenhof. Honora Membro de UEA. En 1934 li esprimis la deziron partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo, kaj eklernis kaj ekposedis flue la lingvon internacian. Nome de la familio Zamenhof, li salutis la kongresanojn dum pluraj kongresoj. Plurfoje vizitis Bjalistokon kiel membro de la Fondumo Zamenhof, respondeca pri la konstruo de Zamenhof-Centro.

**Lazaro Ludoviko ZAMENHOF** (1859-1917)

La kreinto de Esperanto. Jam kiel junulo en sia naskiĝurbo Bjalistoko li revis kaj laboris pri neŭtrala lingvo. La 26-an de julio 1887 li publikigis en Varsovio la unuan lernolibron de Esperanto. En 1959 Unesko proklamis lin unu el la grandaj personecoj de la homaro.

# Laŭtaga programo

## Sabato, la 6-a de aŭgusto

| | |
|---|---|
| 14:00-17:30 | Komitato de UEA 1, *Hodler* |
| 14:00-18:00 | Libroservo 1, *Eichholz* |
| 15:00-16:00 | Unuafojaj Kongresanoj, *Saint-Martin* |
| 19:00-21:00 | Movada Foiro, *Durette (Agora - Konstruaĵo Judith-Jasmin)* |

## Dimanĉo, la 7-a de aŭgusto

| | |
|---|---|
| 09:00-10:00 | Akcepto de diplomatoj |
| 10:00-12:00 | Solena Inaŭguro, *Zamenhof* |
| 12:45-12:55 | Komuna foto, *Korto Harmon* |
| 13:00-13:45 | Franca eksprese 1, *Solis* |
| 13:00-13:45 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M1 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 13:00-14:30 | IKU 1 / AIS 1[1] (inaŭguro; Wandel), *Nourmont* |
| 13:00-14:30 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net K1-K2 (komencantoj), *Beauchemin* |
| 13:00-18:00 | Libroservo 2, *Eichholz* |
| 13:15-14:00 | Esperanto-USA: Estrarkunsido (fermita), *Hodler* |
| 14:00-14:45 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M1 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 14:00-14:45 | Prelego pri Kanado 1 (Historio de Kebekio kaj Kanado antaŭ 1867), *Solis* |
| 14:30-15:30 | KAOEM: Regiona komisiono, *Hodler* |
| 14:45-15:45 | IKU 2 / AIS 2[1] (Maia Jr.), *Nourmont* |
| 15:00-16:00 | Bobelarto 1: Enkonduko, *Saint-Martin* |
| 15:00-16:00 | Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj: Enkonduko en la kongresan temon, *Solis* |
| 15:30-17:00 | Ekumena Diservo, *Christ Church Cathedral: 635 Saint-Catherine St W* |
| 16:00-16:45 | SAT: funkciado kaj projektoj, *Nourmont* |
| 16:00-17:00 | Prelego: Imperiestro, *Beauchemin* |
| 16:00-17:30 | Komitato de UEA 2, *Hodler* |
| 16:15-17:00 | Prelego pri Kanado 2 (La angla lingvo en Kanado), *Solis* |
| 17:00-18:00 | ESF: Ĝisdatigo, *Nourmont* |
| 17:15-18:00 | Aniŝinabeka eksprese 1, *Solis* |
| 17:15-18:00 | Aŭtora duonhoro 1 (Birdoj en Nia Korto + Besta Verbaro), *Saint-Martin* |
| 17:15-18:00 | Internacia Koruso 1, *Beauchemin* |
| 19:00-22:00 | Nacia Vespero, *Zamenhof* |

## Lundo, la 8-a de aŭgusto

| | |
|---|---|
| 09:00-10:30 | Kleriga Lundo 1 (Victor Lebrun, modesta pensanto, sekretario de Tolstoj), *Lapenna* |
| 09:00-10:30 | Kleriga Lundo 2 (Renkontiĝo kun bestoj), *Nourmont* |
| 09:00-10:30 | Kleriga Lundo 3 (Kiel mi ploras), *Solis* |

| | |
|---|---|
| 09:00-18:00 | Libroservo 3, *Eichholz* |
| 10:45-11:45 | IKU 3 / AIS 3[1] (Raola), *Beauchemin* |
| 10:45-12:15 | Kleriga Lundo 4 (Multlingvismo kaj UN: kiu strategio por Esperanto?), *Lapenna* |
| 10:45-12:15 | Kleriga Lundo 5 (Preparseminario por la KER-ekzamenoj), *Nourmont* |
| 10:45-12:15 | Kleriga Lundo 6 (Kiel fari esploradon pri Esperanto-historio), *Solis* |
| 11:45-12:30 | Belartaj Konkursoj, *Saint-Martin* |
| 12:15-13:15 | Afriko: Regionaj komisionoj, *Hodler* |
| 12:30-13:30 | Faka Forumo, *Beauchemin* |
| 12:30-14:00 | Kleriga Lundo 7 (Irako ĉu kolapsanta ŝtato?), *Lapenna* |
| 12:30-14:00 | Kleriga Lundo 8 (La homaranismo de d-ro Zamenhof), *Nourmont* |
| 12:30-14:00 | Kleriga Lundo 9 (La kanada viskio), *Solis* |
| 13:00-13:30 | Aŭtora duonhoro 2 (Georgo Eklernas Esperanton: Sciuru Kanade!), *Saint-Martin* |
| 14:00-14:45 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M2 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 14:00-15:30 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net K3-K4 (komencantoj), *Beauchemin* |
| 14:00-18:00 | Komitato de UEA 3, *Hodler* |
| 14:15-15:00 | Franca eksprese 2, *Solis* |
| 14:15-15:15 | Prelego: Vivancos, *Nourmont* |
| 14:15-16:15 | Panoramo de indiĝenaj lingvoj en Nord-Ameriko, *Lapenna* |
| 15:00-15:45 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M2 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 15:00-16:30 | Internacia Koruso 2, *Nanovfszky* |
| 15:15-16:15 | Kantado de La Espero, *Nanovfszky* |
| 15:15-16:15 | Prelego pri Kanado 3 (Kanadaj Zamenhofoj), *Solis* |
| 16:00-16:45 | Ŭonbulismo: Internacia Meditado, *Beauchemin* |
| 16:15-17:00 | Esperanto-USA: Malfermo, *Nourmont* |
| 16:30-17:15 | Aniŝinabeka eksprese 2, *Solis* |
| 16:45-17:45 | Prelego: Konstruitaj lingvoj, *Lapenna* |
| 17:15-18:00 | INOE: Naturismo, *Beauchemin* |
| 18:00-19:15 | Societo Zamenhof - akcepto (por invititoj), |
| 19:30-21:00 | Bankedo, *Hyatt* |
| 21:00-24:00 | Kongresa Balo, *Hyatt* |

## Mardo, la 9-a de aŭgusto

| | |
|---|---|
| 09:00-09:45 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M3 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 09:00-10:30 | Komitata forumo: Konsciigo, *Hodler* |
| 09:00-10:30 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net K5-K6 (komencantoj), *Beauchemin* |

| | |
|---|---|
| 09:00-11:00 | Scienca Kafejo 1, *Solis* |
| 09:00-14:00 | Tago de Lernado, *Nourmont* |
| 09:00-18:00 | Libroservo 4, *Eichholz* |
| 10:00-10:45 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M3 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 10:45-11:45 | AIS 2[2] (Maia Jr.), *Beauchemin* |
| 11:00-12:30 | Bobelarto 2: INK-gajnintoj, *Saint-Martin* |
| 11:15-12:45 | UN-Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, *Solis* |
| 11:45-12:45 | MONA: Regionaj komisionoj, *Hodler* |
| 12:00-13:00 | AIS 1[2] (Wandel), *Beauchemin* |
| 12:45-13:15 | Bobelarto 3: Honoraj Komitatanoj (Larochelle, Ŝlag), *Saint-Martin* |
| 13:00-13:45 | Franca eksprese 3, *Solis* |
| 13:00-14:30 | Komitata forumo: Kapabligo, *Hodler* |
| 13:30-14:00 | Kinejo 1, *Beauchemin* |
| 13:30-14:15 | Aŭtora duonhoro 3 (Ĉirkaŭ la mondo 500 jarojn post Magelano), *Saint-Martin* |
| 14:00-16:30 | Esperantistoj kaj indiĝenaj lingvoj: Spertoj tra la mondo, *Solis* |
| 14:00-21:00 | KER-ekzamenoj (ĉiuj niveloj), *Tišljar* |
| 14:30-15:15 | Aŭtora duonhoro 4 (La Eta Princo), *Saint-Martin* |
| 14:30-15:15 | IKEL - Etnistoj, *Beauchemin* |
| 14:45-16:15 | UEA respondas, *Nourmont* |
| 14:45-16:15 | UIAE (Advokatoj): Fonda Asembleo, *Hodler* |
| 15:30-16:30 | Bobelarto 4: Legosalono, *Saint-Martin* |
| 15:45-16:30 | Internacia Koruso 3, *Beauchemin* |
| 16:30-18:00 | Omaĝo al Claude Nourmont, *Lapenna* |
| 16:45-18:00 | Kinejo 2: Wapikoni, *Solis* |
| 17:00-17:45 | Esperanto-USA: kunsido, *Beauchemin* |
| 17:00-18:00 | Nova Sento: Koncerto de Stefano kaj Kristina Miroshkina, *Zamenhof* |
| 19:30-20:30 | Koncerto: Joëlle Rabu kaj Nico Rhodes, *Zamenhof* |
| 20:30-21:30 | Koncerto: Yves Desrosiers, *Zamenhof* |

## Ĵaŭdo, la 11-a de aŭgusto

| | |
|---|---|
| 09:00-09:45 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M4 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 09:00-10:00 | Prelego: Falsaj Novaĵoj, *Nourmont* |
| 09:00-10:30 | Komitata forumo: Komunumo, Hodler |
| 09:00-10:30 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net K7-K8 (komencantoj), *Beauchemin* |
| 09:00-18:00 | Esperantologia Konferenco, *Zaleski-Zamenhof* |

| | |
|---|---|
| 09:00-18:00 | Libroservo 5, *Eichholz* |
| 09:15-10:00 | Prelego pri Kanado 4 (La franca lingvo en Kebekio, kultura aspekto), *Solis* |
| 10:00-10:45 | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M4 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 10:30-11:30 | IKU 4 (Madella), *Nourmont* |
| 10:30-11:30 | Muzika-Esperanto-Ligo, *Nanovfszky* |
| 10:30-11:30 | Prelego pri Kanado 5 (Lumo: unua E-revuo Amerika), *Solis* |
| 11:00-12:00 | Ameriko: regiona komisiono, *Hodler* |
| 11:45-12:45 | TEJO sinprezentas, *Nourmont* |
| 12:00-12:30 | Aŭtora duonhoro 5 (La Florejo), *Saint-Martin* |
| 12:00-12:45 | Aniŝinabeka eksprese 3, *Solis* |
| 12:00-13:00 | AIS 3[2] (Raola), *Beauchemin* |
| 12:45-13:15 | Postkongreso, *Nanovfszky* |
| 13:00-13:45 | Franca eksprese 4, *Solis* |
| 13:00-14:00 | Bobelarto 5: Verksesio, *Saint-Martin* |
| 13:00-15:00 | Scienca Kafejo 2, *Nourmont* |
| 13:15-14:00 | Akademio de Esperanto (fermita), *Hodler* |
| 13:30-14:00 | Arto de desegnado, *Beauchemin* |
| 13:45-14:30 | Esperanto-USA: Fermo, *Nanovfszky* |
| 14:00-14:45 | Kinejo 3: Cohen, *Solis* |
| 14:15-15:00 | TEJO-Patronoj, *Beauchemin* |
| 14:45-16:15 | GLAT - Samseksemuloj, *Nanovfszky* |
| 15:00-15:30 | Aŭtora duonhoro 6 (Anne de Verdaj Gablo), *Saint-Martin* |
| 15:00-16:00 | Kunsido pri UN, *Hodler* |
| 15:00-16:30 | Akademio de Esperanto (publika), *Solis* |
| 15:15-15:45 | Prelego: Paralela Universo, *Nourmont* |
| 16:00-16:45 | IKEF - Komercistoj, *Beauchemin* |
| 16:00-16:45 | Prelego: Ekskurso tra vakuo, *Nourmont* |
| 16:15-16:45 | Aŭtora duonhoro 7 (Maria Chapdeleine), *Saint-Martin* |
| 16:30-18:00 | Internacia Koruso 4, *Nanovfszky* |
| 16:30-18:00 | Komitata forumo: Kunordigo, *Hodler* |
| 16:45-17:45 | Prelego pri Kanado 6 (Mallonga Historio de Kanado), *Solis* |
| 17:00-18:00 | Koncerto: Banĝo-Esperanto, *Zamenhof* |
| 19:30-20:30 | Teatraĵo "1910", *Zamenhof* |
| 20:30-21:30 | Koncerto: Stelmani': Gijom' Armide kaj gastaj artistoj, *Zamenhof* |

## Vendredo, la 12-a de aŭgusto

| | |
|---|---|
| 09:00-09:30 | Kinejo 4: Rankin, *Solis* |
| 09:00-09:45 | Tajĝiĉuano, *Saint-Martin* |

| | |
|---|---|
| 09:00-10:30 | Perspektivoj al lingvolernado kaj lingvorevivigo (1), *Lapenna* |
| 09:00-12:30 | Komitato de UEA 4, *Hodler* |
| 09:00-17:30 | KER-ekzamenoj (ĉiuj niveloj), *Tišljar* |
| 09:00-18:00 | Libroservo 6, *Eichholz* |
| 09:45-10:45 | Prelego pri Kanado 7 (Diverslingva muziko en Kanado), *Solis* |
| 10:00-10:30 | Aŭtora duonhoro 8 (La Kanada Verkaro), *Saint-Martin* |
| 10:00-10:45 | IKEK - Komunistoj, *Nanovfszky* |
| 10:45-12:15 | Perspektivoj al lingvolernado kaj lingvorevivigo (2), *Lapenna* |
| 11:00-12:00 | Bobelarto 6: Pentro-kurso, *Nanovfszky* |
| 11:00-12:00 | Prelego pri Kanado 8 (Kanada kaj Kebekia Lingvopolitiko), *Solis* |
| 11:00-12:00 | Prelego: Esperanto kaj anarkiismo, *Nourmont* |
| 12:00-12:30 | Prelego: Tokipono, *Saint-Martin* |
| 12:15-13:00 | KEA: Kunsido, *Solis* |
| 12:30-13:30 | IKU 5 (Mak), *Lapenna* |
| 12:30-13:30 | Prelego: Scienc-fikciaj esperantistoj, *Nourmont* |
| 12:30-14:15 | ATEO - ateistoj, *Nanovfszky* |
| 13:15-14:00 | Libroj de la Jaro, *Saint-Martin* |
| 13:30-14:30 | Prelego pri Kanado 9 (Malantaŭ la teatraĵo “1910”), *Solis* |
| 13:45-14:45 | IKU 6 (Keiichiro), *Lapenna* |
| 14:00-14:45 | Tanzanio - ĉu preta por UK? *Nourmont* |
| 14:00-15:00 | Eŭropo: Regionaj komisionoj, *Hodler* |
| 14:30-15:30 | CED, *Nanovfszky* |
| 15:00-15:30 | Aŭtora duonhoro 9 (Kiel Eldoni Libron ("Soleca Fridujeto”)), *Saint-Martin* |
| 15:00-16:15 | Scienca Forumo, *Nourmont* |
| 16:00-16:45 | Aŭkcio, *Lapenna* |
| 16:00-16:45 | Aŭtora duonhoro 10 (Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado), *Saint-Martin* |
| 16:00-17:30 | Internacia Koruso 5, *Nanovfszky* |
| 16:15-17:30 | Kinejo 5: Senveprigistoj, *Solis* |
| 16:30-17:30 | IKU 7 (Sayadpour Zanjani), *Nourmont* |
| 17:00-18:00 | Venontaj UK-oj, *Lapenna* |
| 19:30-20:45 | Koncerto: Bia, *Zamenhof* |
| 20:45-21:45 | Internacia Arta Vespero, *Zamenhof* |

## Sabato, la 13-a de aŭgusto

| | |
|---|---|
| 10:00-12:00 | Solena Fermo, *Zamenhof* |
| 12:00-14:00 | Libroservo 7, *Eichholz* |

## programo — sabato, 6 aŭgusto 2022

| salono/horo | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **Zamenhof** Cinéma Impérial | | | | | | | | | | | | | | |
| **Hodler** DS-1420 | | | | | | Komitato de UEA 1 | | | | | | | | |
| **Lapenna** DS-R510 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Nourmont** DS-R520 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Solis** DS-R525 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Beauchemin** DS-1520 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Saint-Martin** DS-1545 | | | | | | | Unuafojaj Kongr. | | | | | | | |
| **Nanovfszky** DS-1570 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Eichholz** DS-1540 | | | | | | Libroservo | | | | | | | | |
| **Harmon** Korto | | | | | | | | | | | | | | |
| **Benczik** Halo | | | | Registriĝo | | | | | | | | | | |
| **Durette** Agora | | | | | | | | | | | Movada Foiro | | | |

| programo | dimanĉo, 7 aŭgusto 2022 | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| salono/horo | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 |
| **Zamenhof** Cinéma Impérial | | Solena Inaŭguro | | | | | | | | | Nacia Vespero | | | |
| **Hodler** DS-1420 | | | | | Eo-USA: Estrark. (fermita) | KAOEM: Regionaj komision. | | Komitato de UEA 2 | | | | | | |
| **Lapenna** DS-R510 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Nourmont** DS-R520 | | | | | IKU1/AIS1[1] (inaŭguro; Wandel) | IKU2/AIS2[1] (Maia Jr.) | | SAT | ESF: Ĝisdatigo | | | | | |
| **Solis** DS-R525 | | | | | La franca eksprese 1 | Prelego pri Kanado 1 | Kongresa Temo 1 | Prelego pri Kanado 2 | Aniŝinabeka ekspr. 1 | | | | | |
| **Beauchemin** DS-1520 | | | | | Paroligaj Lecionoj K1-K2 (komencantoj) | | | Prelego: Imperiestro | Internacia Koruso1 | | | | | |
| **Saint-Martin** DS-1545 | | | | | Parolig. Lecion. M1 | Parolig. Lecion. M1 | Bobelarto 1: Enkond. | | Aŭt. duonhoro | | | | | |
| **Nanovfszky** DS-1570 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Eichholz** DS-1540 | | | | | Libroservo | | | | | | | | | |
| **Harmon** Korto | | | | Komuna foto | Junulara prog. | | | | | | | | | |
| **Benczik** Halo | | | | | | | | | | | | | | |
| **Aliloke** | | | | | | | Ekumena Diservo | | | | | | | |

# programo — lundo, 8 aŭgusto 2022

| salono/horo | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **Zamenhof** Cinéma Impérial | | | | | | | | | | | | | | |
| **Hodler** DS-1420 | | | | Afriko: Regionaj komision. | | Komitato de UEA 3 | | | | | | | | |
| **Lapenna** DS-R510 | Kleriga Lundo 1 | Kleriga Lundo 4 | | Kleriga Lundo 7 | | Kongresa Temo 2 | | Prelego: Konstr. lingvoj | | | | | | |
| **Nourmont** DS-R520 | Kleriga Lundo 2 | Kleriga Lundo 5 | | Kleriga Lundo 8 | | Prelego: Vivancos | | Eo-USA: Malfer. | | | | | | |
| **Solis** DS-R525 | Kleriga Lundo 3 | Kleriga Lundo 6 | | Kleriga Lundo 9 | | La franca ekspr. 2 | Prelego pri Kanado 3 | Aniŝin-abeka ekspr. 2 | | | | | | |
| **Beauchemin** DS-1520 | | IKU 3/ AIS 3[1] (Raola) | | Faka Forumo | | Paroligaj Leci-onoj K3-K4 (komencantoj) | | Ŭonbu-lismo | INOE: Natur-ismo | | | | | |
| **Saint-Martin** DS-1545 | | | Belart. Konku-rsoj | | Aŭt. duon-hor. 2 | Parolig. Lecion. M2 | Parolig. Lecion. M2 | | | | | | | |
| **Nanovfszky** DS-1570 | | | | | | | Kantado de La Espero | Internacia Koruso 2 | | | | | | |
| **Eichholz** DS-1540 | Libroservo | | | | | | | | | | | | | |
| **Harmon** Korto | | | | | | | | | | | | | | |
| **Benczik** Halo | | | | | | | | | | | | | | |
| **Aliloke** | | | | | | | | | | Societ. Zam. akcepto (por invititoj) | Bankedo | | Kongresa Balo (daŭras ĝis 24:00) | |

# programo — mardo, 9 aŭgusto 2022

| salono/horo | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **ZAMENHOF** Cinéma Impérial | | | | | | | | | Koncerto: S. kaj K. Miroshkina | | Koncerto: J. Rabu kaj N. Rhodes | Koncerto: Yves Desrosiers | | |
| **HODLER** DS-1420 | Komitata forumo: Konsciigo | | MONA: Regionaj komision. | | Komitata forumo: Kapabligo | UIAE: Fonda Asembleo | | | | | | | | |
| **LAPENNA** DS-R510 | Tago de Lernado | | | | | UEA respondas | | Omaĝo al Claude Nourmont | | | | | | |
| **NOURMONT** DS-R520 | | | | | | | | | | | | | | |
| **SOLIS** DS-R525 | Scienca Kafejo 1 | | Kongresa Temo 3 | | La franca ekspr.3 | Kongresa Temo 4 | | Kinejo 2: Wapikoni | | | | | | |
| **BEAUCHEMIN** DS-1520 | Paroligaj Lecionoj K5-K6 (komencantoj) | AIS $2^2$ (Maia Jr.) | | AIS $1^2$ (Wandel) | Kinejo 1 | IKEL - Etnistoj | Internacia Koruso3 | | Eo-USA: kunsido | | | | | |
| **SAINT-MARTIN** DS-1545 | Parolig. Lecion. M3 | Parolig. Lecion. M3 | Bobelarto 2: INK-gajnintoj | Bobelarto 3 | Aŭtora duonhoro 3 | Aŭtora duonhoro 4 | Bobelarto 4: Legosalono | | | | | | | |
| **NANOVFSZKY** DS-1570 | | | | | | | | | | | | | | |
| **EICHHOLZ** DS-1540 | Libroservo | | | | | | | | | | | | | |
| **HARMON** Korto | | | | | | | | | | | | | | |
| **BENCZIK** Halo | | | | | | | | | | | | | | |
| **TIŠLJAR** DS-2505 | | | | | | KER ekzamenoj - parolaj partoj (ĉiuj niveloj) | | | | | | | | |

# programo — ĵaŭdo, 11 aŭgusto 2022

| salono/horo | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **Zamenhof** Cinéma Impérial | | | | | | | | | Koncerto: Banĝo Esperanto | | Teatraĵo "1910" | Koncerto: Stelmani' | | |
| **Hodler** DS-1420 | Komitata forumo: Komunumo | | Ameriko: regionaj komision. | | AdE (fermita) | | Kunsido pri UN | Komitata forumo: Kunordigo | | | | | | |
| **Lapenna** DS-R510 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Nourmont** DS-R520 | Prelego: Falsaj Novaĵoj | IKU 4 (Madella) | TEJO sin-prezentas | | Scienca Kafejo 2 | | Prel: Paral. Univ. | Preleg: Ekskur. tra vak. | | | | | | |
| **Solis** DS-R525 | Prel. pri Kanado 4 | Prelego pri Kanado 5 | | Aniŝin-abeka ekspr.3 | La franca ekspr.4 | Kinejo 3: Cohen | Akademio de Esperanto (publika) | Prelego pri Kanado 6 | | | | | | |
| **Beauchemin** DS-1520 | Paroligaj Leci-onoj K7-K8 (komencantoj) | | | AIS 3² (Raola) | Arto des-egni | TEJO Patron-oj | | IKEF - Komer-cistoj | | | | | | |
| **Saint-Martin** DS-1545 | Parolig. Lecion. M4 | Parolig. Lecion. M4 | | Aŭt. duon-hor. 5 | Bobelarto 5: Verk-sesio | | Aŭt. duon-hor. 6 | Aŭt. duon-hor. 7 | | | | | | |
| **Nanovfszky** DS-1570 | | Muzika-Esperanto Ligo | | Post-kon-greso | Eo-USA: Fermo | GLAT - Samseksemuloj | | Internacia Koruso 4 | | | | | | |
| **Eichholz** DS-1540 | Libroservo | | | | | | | | | | | | | |
| **Harmon** Korto | | | | | | | | | | | | | | |
| **Benczik** Halo | | | | | | | | | | | | | | |
| **Zaleski-Zamenhof** DS-1525 | Esperantologia Konferenco | | | | | | | | | | | | | |

# programo — vendredo, 12 aŭgusto 2022

| salono/horo | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 | 14 | 15 | 16 | 17 | 18 | 19 | 20 | 21 | 22 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **Zamenhof** Cinéma Impérial | | | | | | | | | | | Koncerto: Bia | Internacia Arta Vespero | | |
| **Hodler** DS-1420 | Komitato de UEA 4 | | | | | Eŭropo: Regionaj komision. | | | | | | | | |
| **Lapenna** DS-R510 | Kongresa Temo 5 | Kongresa Temo 6 | | IKU 5 (Mak) | IKU 6 (Keiichiro) | | | Aŭkcio | Venontaj UK-oj | | | | | |
| **Nourmont** DS-R520 | | | Prelego: Esper. kaj anarkiism. | Prelego: Scienc-fikc. e-istoj | | Tanzan. ĉu preta por UK? | Scienca Forumo | IKU 7 (Sayadpour Zanjani) | | | | | | |
| **Solis** DS-R525 | Kin-ejo 4 | Prel. pri Kanado 7 | Prel. pri Kanado 8 | KEA: Kun-sido | Prel. pri Kanado 9 | | | Kinejo 5: Senveprig-istoj | | | | | | |
| **Beauchemin** DS-1520 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Saint-Martin** DS-1545 | Tajĝi-ĉuano | Aŭt. duon-hor. 8 | | Prel: Toki-pono | Libroj de la Jaro | | Aŭt. duon-hor. 9 | Aŭtora duon-horo 10 | | | | | | |
| **Nanovfszky** DS-1570 | | IKEK - Komu-nistoj | Bobelarto 6: Pentro-kurso | ATEO - Ateistoj | | CED | | Internacia Koruso 5 | | | | | | |
| **Eichholz** DS-1540 | Libroservo | | | | | | | | | | | | | |
| **Harmon** Korto | | | | | | | | | | | | | | |
| **Benczik** Halo | | | | | | | | | | | | | | |
| **Horst-Kolińska** DS-2508 | KER ekzamenoj (ĉiuj niveloj) | | | | | | | | | | | | | |

| **programo** | **sabato, 13 aŭgusto 2022** | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **salono/horo** | **9** | **10** | **11** | **12** | **13** | **14** | **15** | **16** | **17** | **18** | **19** | **20** | **21** | **22** |
| **Zamenhof**<br>Cinéma Impérial | | Solena fermo | | | | | | | | | | | | |
| **Hodler**<br>DS-1420 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Lapenna**<br>DS-R510 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Nourmont**<br>DS-R520 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Solis**<br>DS-R525 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Beauchemin**<br>DS-1520 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Saint-Martin**<br>DS-1545 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Nanovfszky**<br>DS-1570 | | | | | | | | | | | | | | |
| **Eichholz**<br>DS-1540 | | | | Libroservo | | | | | | | | | | |
| **Harmon**<br>Korto | | | | | | | | | | | | | | |
| **Benczik**<br>Halo | | | | | | | | | | | | | | |
| **Horst-Kolińska**<br>DS-2508 | | | | | | | | | | | | | | |

# Alfabeta listo de la programeroj

## A

| | | |
|---|---|---|
| 12:15-13:15 | lun | Afriko: Regionaj komisionoj, *Hodler* |
| 12:00-13:00 | mar | AIS 1[2] (Wandel), *Beauchemin* |
| 10:45-11:45 | mar | AIS 2[2] (Maia Jr.), *Beauchemin* |
| 12:00-13:00 | ĵaŭ | AIS 3[2] (Raola), *Beauchemin* |
| 13:15-14:00 | ĵaŭ | Akademio de Esperanto (fermita), *Hodler* |
| 15:00-16:30 | ĵaŭ | Akademio de Esperanto (publika), *Solis* |
| 09:00-10:00 | dim | Akcepto de diplomatoj |
| 11:00-12:00 | ĵaŭ | Ameriko: regionaj komisionoj, *Hodler* |
| 17:15-18:00 | dim | Aniŝinabeka eksprese 1, *Solis* |
| 16:30-17:15 | lun | Aniŝinabeka eksprese 2, *Solis* |
| 12:00-12:45 | ĵaŭ | Aniŝinabeka eksprese 3, *Solis* |
| 13:30-14:00 | ĵaŭ | Arto de desegnado, *Beauchemin* |
| 12:30-14:15 | ven | ATEO - ateistoj, *Nanovfszky* |
| 17:15-18:00 | dim | Aŭtora duonhoro 1 (Birdoj en Nia Korto + Besta Verbaro), *Saint-Martin* |
| 13:00-13:30 | lun | Aŭtora duonhoro 2 (Georgo Eklernas Esperanton: Sciuru Kanade!), *Saint-Martin* |
| 13:30-14:15 | mar | Aŭtora duonhoro 3 (Ĉirkaŭ la mondo 500 jarojn post Magelano), *Saint-Martin* |
| 14:30-15:15 | mar | Aŭtora duonhoro 4 (La Eta Princo), *Saint-Martin* |
| 12:00-12:30 | ĵaŭ | Aŭtora duonhoro 5 (La Florejo), *Saint-Martin* |
| 15:00-15:30 | ĵaŭ | Aŭtora duonhoro 6 (Anne de Verdaj Gablo), *Saint-Martin* |
| 16:15-16:45 | ĵaŭ | Aŭtora duonhoro 7 (Maria Chapdeleine), *Saint-Martin* |
| 10:00-10:30 | ven | Aŭtora duonhoro 8 (La Kanada Verkaro), *Saint-Martin* |
| 15:00-15:30 | ven | Aŭtora duonhoro 9 (Kiel Eldoni Libron ("Soleca Fridujeto")), *Saint-Martin* |
| 16:00-16:45 | ven | Aŭtora duonhoro 10 (Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado), *Saint-Martin* |
| 16:00-16:45 | ven | Aŭkcio, *Lapenna* |

## B

| | | |
|---|---|---|
| 19:30-21:00 | lun | Bankedo, *Hyatt* |
| 11:45-12:30 | lun | Belartaj Konkursoj, *Saint-Martin* |
| 15:00-16:00 | dim | Bobelarto 1: Enkonduko, *Saint-Martin* |
| 11:00-12:30 | mar | Bobelarto 2: INK-gajnintoj, *Saint-Martin* |
| 12:45-13:15 | mar | Bobelarto 3: Honoraj Komitatanoj (Larochelle, Ŝlag), *Saint-Martin* |
| 15:30-16:30 | mar | Bobelarto 4: Legosalono, *Saint-Martin* |
| 13:00-14:00 | ĵaŭ | Bobelarto 5: Verksesio, *Saint-Martin* |
| 11:00-12:00 | ven | Bobelarto 6: Pentro-kurso, *Nanovfszky* |

## C

| | | |
|---|---|---|
| 14:30-15:30 | ven | CED (la Centro de Esploro kaj Dokumentado), *Nanovfszky* |

## E

| | | |
|---|---|---|
| 15:30-17:00 | dim | Ekumena Diservo, *Christ Church Cathedral: 635 Saint-Catherine St W* |
| 17:00-18:00 | dim | ESF: Ĝisdatigo, *Nourmont* |
| 14:00-16:30 | mar | Esperantistoj kaj indiĝenaj lingvoj: Spertoj tra la mondo, *Solis* |
| 13:15-14:00 | dim | Esperanto-USA: Estrarkunsido (fermita), *Hodler* |
| 13:45-14:30 | ĵaŭ | Esperanto-USA: Fermo, *Nanovfszky* |
| 17:00-17:45 | mar | Esperanto-USA: kunsido, *Beauchemin* |
| 16:15-17:00 | lun | Esperanto-USA: Malfermo, *Nourmont* |
| 09:00-18:00 | ĵaŭ | Esperantologia Konferenco, *Zaleski-Zamenhof* |
| 14:00-15:00 | ven | Eŭropo: Regionaj komisionoj, *Hodler* |

## F

| | | |
|---|---|---|
| 12:30-13:30 | lun | Faka Forumo, *Beauchemin* |
| 13:00-13:45 | dim | Franca eksprese 1, *Solis* |
| 14:15-15:00 | lun | Franca eksprese 2, *Solis* |
| 13:00-13:45 | mar | Franca eksprese 3, *Solis* |
| 13:00-13:45 | ĵaŭ | Franca eksprese 4 *Solis* |

## G

| | | |
|---|---|---|
| 14:45-16:15 | ĵaŭ | GLAT - Samseksemuloj, *Nanovfszky* |

## I

| | | |
|---|---|---|
| 16:00-16:45 | ĵaŭ | IKEF - Komercistoj, *Beauchemin* |
| 10:00-10:45 | ven | IKEK - Komunistoj, *Nanovfszky* |
| 14:30-15:15 | mar | IKEL - Etnistoj, *Beauchemin* |
| 13:00-14:30 | dim | IKU 1 / AIS 1[1] (inaŭguro; Wandel), *Nourmont* |
| 14:45-15:45 | dim | IKU 2 / AIS 2[1] (Maia Jr.), *Nourmont* |
| 10:45-11:45 | lun | IKU 3 / AIS 3[1] (Raola), *Beauchemin* |
| 10:30-11:30 | ĵaŭ | IKU 4 (Madella), *Nourmont* |
| 12:30-13:30 | ven | IKU 5 (Mak), *Lapenna* |
| 13:45-14:45 | ven | IKU 6 (Keiichiro), *Lapenna* |
| 16:30-17:30 | ven | IKU 7 (Sayadpour Zanjani), *Nourmont* |
| 17:15-18:00 | lun | INOE: Naturismo, *Beauchemin* |
| 20:45-21:45 | ven | Internacia Arta Vespero, *Zamenhof* |
| 17:15-18:00 | dim | Internacia Koruso 1, *Beauchemin* |
| 15:00-16:30 | lun | Internacia Koruso 2, *Nanovfszky* |
| 15:45-16:30 | mar | Internacia Koruso 3, *Beauchemin* |
| 16:30-18:00 | ĵaŭ | Internacia Koruso 4, *Nanovfszky* |
| 16:00-17:30 | ven | Internacia Koruso 5, *Nanovfszky* |

## J

| | | |
|---|---|---|
| 15:00-16:00 | dim | Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj: Enkonduko en la kongresan temon, *Solis* |

# K

15:15-16:15 lun Kantado de La Espero, *Nanovfszky*
14:30-15:30 dim KAOEM: Regiona komisiono, *Hodler*
12:15-13:00 ven KEA: Kunsido, *Solis*
14:00-21:00 mar KER-ekzamenoj (ĉiuj niveloj), *Tišljar*
09:00-17:30 ven KER-ekzamenoj (ĉiuj niveloj), *Tišljar*
13:30-14:00 mar Kinejo 1, *Beauchemin*
16:45-18:00 mar Kinejo 2: Wapikoni, *Solis*
14:00-14:45 ĵaŭ Kinejo 3: Cohen, *Solis*
09:00-09:30 ven Kinejo 4: Rankin, *Solis*
16:15-17:30 ven Kinejo 5: Senveprigistoj, *Solis*
09:00-10:30 lun Kleriga Lundo 1 (Victor Lebrun, modesta pensanto, sekretario de Tolstoj), *Lapenna*
09:00-10:30 lun Kleriga Lundo 2 (Renkontiĝo kun bestoj), *Nourmont*
09:00-10:30 lun Kleriga Lundo 3 (Kiel mi ploras), *Solis*
10:45-12:15 lun Kleriga Lundo 4 (Multlingvismo kaj UN: kiu strategio por Esperanto?), *Lapenna*
10:45-12:15 lun Kleriga Lundo 5 (Preparseminario por la KER-ekzamenoj), *Nourmont*
10:45-12:15 lun Kleriga Lundo 6 (Kiel fari esploradon pri Esperanto-historio), *Solis*
12:30-14:00 lun Kleriga Lundo 7 (Irako ĉu kolapsanta ŝtato?), *Lapenna*
12:30-14:00 lun Kleriga Lundo 8 (La homaranismo de d-ro Zamenhof), *Nourmont*
12:30-14:00 lun Kleriga Lundo 9 (La kanada viskio), *Solis*
13:00-14:30 mar Komitata forumo: Kapabligo, *Hodler*
09:00-10:30 ĵaŭ Komitata forumo: Komunumo, *Hodler*
09:00-10:30 mar Komitata forumo: Konsciigo, *Hodler*
16:30-18:00 ĵaŭ Komitata forumo: Kunordigo, *Hodler*
14:00-17:30 sab Komitato de UEA 1, *Hodler*
16:00-17:30 dim Komitato de UEA 2, *Hodler*
14:00-18:00 lun Komitato de UEA 3, *Hodler*
09:00-12:30 ven Komitato de UEA 4, *Hodler*
12:45-12:55 dim Komuna foto, *Korto Harmon*
17:00-18:00 ĵaŭ Koncerto: Banĝo-Esperanto, *Zamenhof*
19:30-20:45 ven Koncerto: Bia, *Zamenhof*
19:30-20:30 mar Koncerto: Joëlle Rabu kaj Nico Rhodes, *Zamenhof*
20:30-21:30 ĵaŭ Koncerto: Stelmani': Gijom' Armide kaj gastaj artistoj, *Zamenhof*
20:30-21:30 mar Koncerto: Yves Desrosiers, *Zamenhof*
21:00-24:00 lun Kongresa Balo, *Hyatt*
15:00-16:00 ĵaŭ Kunsido pri UN, *Hodler*

# L

13:15-14:00 ven Libroj de la Jaro, *Saint-Martin*
14:00-18:00 sab Libroservo 1, *Eichholz*

| | | |
|---|---|---|
| 13:00-18:00 | dim | Libroservo 2, *Eichholz* |
| 09:00-18:00 | lun | Libroservo 3, *Eichholz* |
| 09:00-18:00 | mar | Libroservo 4, *Eichholz* |
| 09:00-18:00 | ĵaŭ | Libroservo 5, *Eichholz* |
| 09:00-18:00 | ven | Libroservo 6, *Eichholz* |
| 12:00-14:00 | sab2 | Libroservo 7, *Eichholz* |

## M

| | | |
|---|---|---|
| 11:45-12:45 | mar | MONA: Regiona komisiono, *Hodler* |
| 19:00-21:00 | sab | Movada Foiro, *Durette (Agora - Konstruaĵo Judith-Jasmin)* |
| 10:30-11:30 | ĵaŭ | Muzika Esperanto-Ligo, *Nanovfszky* |

## N

| | | |
|---|---|---|
| 19:00-22:00 | dim | Nacia Vespero, *Zamenhof* |
| 17:00-18:00 | mar | Nova Sento: Koncerto de Stefano kaj Kristina Miroshkina, *Zamenhof* |

## O

| | | |
|---|---|---|
| 16:30-18:00 | mar | Omaĝo al Claude Nourmont, *Lapenna* |

## P

| | | |
|---|---|---|
| 14:15-16:15 | lun | Panoramo de indiĝenaj lingvoj en Nord-Ameriko, *Lapenna* |
| 13:00-14:30 | dim | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net K1-K2 (komencantoj), *Beauchemin* |
| 14:00-15:30 | lun | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net K3-K4 (komencantoj), *Beauchemin* |
| 09:00-10:30 | mar | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net K5-K6 (komencantoj), *Beauchemin* |
| 09:00-10:30 | ĵaŭ | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net K7-K8 (komencantoj), *Beauchemin* |
| 13:00-13:45 | dim | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M1 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 14:00-14:45 | dim | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M1 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 14:00-14:45 | lun | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M2 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 15:00-15:45 | lun | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M2 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 09:00-09:45 | mar | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M3 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 10:00-10:45 | mar | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M3 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 09:00-09:45 | ĵaŭ | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M4 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 10:00-10:45 | ĵaŭ | Paroligaj Lecionoj kun edukado.net M4 (mezniveluloj), *Saint-Martin* |
| 09:00-10:30 | ven | Perspektivoj al lingvolernado kaj lingvorevivigo (1), *Lapenna* |
| 10:45-12:15 | ven | Perspektivoj al lingvolernado kaj lingvorevivigo (2), *Lapenna* |
| 12:45-13:15 | ĵaŭ | Postkongreso, *Nanovfszky* |
| 14:00-14:45 | dim | Prelego pri Kanado 1 (Historio de Kebekio kaj Kanado antaŭ 1867), *Solis* |
| 16:15-17:00 | dim | Prelego pri Kanado 2 (La angla lingvo en Kanado), *Solis* |
| 15:15-16:15 | lun | Prelego pri Kanado 3, (Kanadaj Zamenhofoj), *Solis* |
| 09:15-10:00 | ĵaŭ | Prelego pri Kanado 4 (La franca lingvo en Kebekio, kultura aspekto), *Solis* |
| 10:30-11:30 | ĵaŭ | Prelego pri Kanado 5 (Lumo: unua E-revuo Amerika), *Solis* |

| | | |
|---|---|---|
| 16:45-17:45 | ĵaŭ | Prelego pri Kanado 6 (Mallonga Historio de Kanado), *Solis* |
| 09:45-10:45 | ven | Prelego pri Kanado 7 (Diverslingva muziko en Kanado), *Solis* |
| 11:00-12:00 | ven | Prelego pri Kanado 8 (Kanada kaj Kebekia Lingvopolitiko), *Solis* |
| 13:30-14:30 | ven | Prelego pri Kanado 9 (Malantaŭ la teatraĵo "1910"), *Solis* |
| 16:00-16:45 | ĵaŭ | Prelego: Ekskurso tra vakuo, *Nourmont* |
| 11:00-12:00 | ven | Prelego: Esperanto kaj anarkiismo, *Nourmont* |
| 09:00-10:00 | ĵaŭ | Prelego: Falsaj Novaĵoj, *Nourmont* |
| 16:00-17:00 | dim | Prelego: Imperiestro, *Beauchemin* |
| 16:45-17:45 | lun | Prelego: Konstruitaj lingvoj, *Lapenna* |
| 15:15-15:45 | ĵaŭ | Prelego: Paralela Universo, *Nourmont* |
| 12:30-13:30 | ven | Prelego: Scienc-fikciaj esperantistoj, *Nourmont* |
| 12:00-12:30 | ven | Prelego: Tokipono, *Saint-Martin* |
| 14:15-15:15 | lun | Prelego: Vivancos, *Nourmont* |

## S

| | | |
|---|---|---|
| 16:00-16:45 | dim | SAT: funkciado kaj projektoj, *Nourmont* |
| 15:00-16:15 | ven | Scienca Forumo, *Nourmont* |
| 09:00-11:00 | mar | Scienca Kafejo 1, *Solis* |
| 13:00-15:00 | ĵaŭ | Scienca Kafejo 2, *Nourmont* |
| 18:00-19:15 | lun | Societo Zamenhof - akcepto (por invititoj) |
| 10:00-12:00 | sab2 | Solena Fermo, *Zamenhof* |
| 10:00-12:00 | dim | Solena Inaŭguro, *Zamenhof* |

## T

| | | |
|---|---|---|
| 09:00-14:00 | mar | Tago de Lernado, *Nourmont* |
| 09:00-09:45 | ven | Tajĝiĉuano, *Saint-Martin* |
| 14:00-14:45 | ven | Tanzanio - ĉu preta por UK?, *Nourmont* |
| 19:30-20:30 | ĵaŭ | Teatraĵo "1910", *Zamenhof* |
| 14:15-15:00 | ĵaŭ | TEJO-Patronoj, *Beauchemin* |
| 11:45-12:45 | ĵaŭ | TEJO sinprezentas, *Nourmont* |

## U

| | | |
|---|---|---|
| 14:45-16:15 | mar | UEA respondas, *Nourmont* |
| 14:45-16:15 | mar | UIAE (Advokatoj): Fonda Asembleo, *Hodler* |
| 11:15-12:45 | mar | UN-Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, *Solis* |
| 15:00-16:00 | sab | Unuafojaj Kongresanoj, *Saint-Martin* |

## Ŭ


| | | |
|---|---|---|
| 16:00-16:45 | lun | Ŭonbulismo: Internacia Meditado, *Beauchemin* |

## V

| | | |
|---|---|---|
| 17:00-18:00 | ven | Venontaj UK-oj, *Lapenna* |

# Kiu gajnos?

Dum la premio-ceremonio, ni anoncos
la gajnintojn de la Interkultura Novelo-Konkurso
kaj legos kune iliajn novelojn!




Akademio Literatura de Esperanto

BOBEL ARTO

# Eta ABC de la kongresano

**Afiŝoj**. Estas strikte malpermesite pendigi, glui, surpingli aŭ simile iujn ajn afiŝojn, notojn, fotojn aŭ iun ajn objekton sur la muroj, kolonoj, traboj, pordoj, fenestroj aŭ iu ajn alia loko de la kongresejo! Tiuj, kiuj malrespektos tiun ĉi regulon, devos pagi la kostojn por forigo, purigo kaj riparo de la loko, laŭ la kostindikoj de la kongresejo.

**Akurateco**. La organizantoj klopodos rigore respektigi la komencajn kaj finajn horojn de la kunsidoj. La pordoj estos fermitaj je la fiksitaj horoj. Kongresanoj bv. ne eniri kaj forlasi la salonojn, dum la kunsidoj daŭras. Tio aparte validas por la vesperaj kaj artaj programeroj!

**Deĵorantoj**. La deĵorantoj estas libervolaj personoj, kiuj streĉe laboras dum multaj sinsekvaj horoj por servi amason da kongresanoj. Indulgu ilin per afablo kaj bonhumoro!

**Disdonado de dokumentoj**. Nenia dokumento aŭ varbilo estu disdonata en la kongresejo sen permeso de respondeculo de UEA. Nerajtigitaj dokumentoj estos konfiskitaj.

**Enirpermeso**. Nur portantoj de la kongresa insigno aŭ vizitantoj kun unutaga bileto rajtas eniri kaj partopreni la kongresajn laborojn. Unutagaj biletoj (50 EUR) estas aĉeteblaj ĉe la Kasisto de UEA.

**Fotado**. Principe oni rajtas foti en la kongresejo, kondiĉe ke tio ne perturbu la etoson de la solenaĵoj nek ĝenu aliajn kongresanojn. Estas nepre malpermesite foti dum teatraĵoj kaj aliaj artaj programeroj. Okaze de neplenumo de la supraj kondiĉoj respondeculo de UEA rajtas malpermesi al la koncerna persono pluan fotadon.

**Fumado**. Estas strikte malpermesite fumi ene de la kongresejo.

**Komercado**. Kelkaj kongresanoj kaj komercaj firmaoj estas rajtigitaj de UEA reklami sin ĉe apartaj budoj en la kongresejo aŭ pere de la dokumentujoj. Al neniu sen specifa aprobo de UEA estas permesate tiamaniere uzi la kongresejon.

**Laborkunsidoj**. Se en iu kunsido vi deziras paroli, levu la manon, turnu vin al la prezidanto kaj, ricevinte la parolvicon, unue diru viajn nomon, landon kaj kongresnumeron. Parolu klare kaj koncize.

**Malsanuloj**. Por vere urĝaj kazoj, bv. anonciĝi ĉe la informejo. En la kazo de suspekto pri Kovim-19 bv. agi laŭ la regomendoj en la p. 41.

**Perditaj objektoj.** Se vi perdas/trovas iun objekton, bv. serĉi/porti ĝin al la giĉeto Informejo.

**Porteblaj telefonoj**. Estas strikte malpermesite teni porteblajn telefonojn enŝaltitaj ene de la kunsidĉambroj kaj dum artaj prezentoj. Se vi nepre devas teni vian porteblan telefonon enŝaltita (ekz. ĉar vi estas en tiu momento laboranta kuracisto) lasu ĝin sensona kaj neniel respondu al vokoj ene de la ĉambroj!


# Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

# Giĉetoj

**Informejo**

Se vi ne scias, kien iri aŭ kiel solvi iun problemon, se vi bezonas informon pri la konstruaĵo aŭ pri la urbo, jen la ĝusta loko por helpi vin. Ĝi tamen ne donas turismajn informojn.

**Ekskursoj**

Pluraj ekskursoj jam estas plenaj, sed en kelkaj restas liberaj lokoj. Ĉiujn gravajn informojn vi ricevos ĉe tiu ĉi giĉeto. Principe ne eblas malmendi aŭ ŝanĝi la ekskursojn dum la kongreso. Por la partoprenantoj de la postkongresaj ekskursoj estas kunsido en vendredo. Bv. konsulti la programon.

**Venontaj UK-oj**


Dum la semajno, ĉe la budo de la 108-a UK, vi povos ricevi diversajn informojn pri Torino kaj Italio kaj ankaŭ aliĝi al tiu UK. Vendrede en la salono Lapenna je la 17:00 estos prezento de la kongreso en Torino.

**Kasisto de UEA**

Ĉe la kasisto eblas aranĝi aferojn pri via UEA-konto kaj aliĝi al UEA.

**Faka Budo**

La Faka Budo estas servo por la fakaj asocioj kiuj ne havas sufiĉe da rimedoj por lui apartan budon, kaj tial povas senpage utiligi tiun, kiun UEA disponigas dum unu tago – en mardo – al pluraj FA-oj kiuj deĵoras laŭ plano anticipe preparita laŭ la mendoj.



# Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA!
Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso.
La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe https://uea.org/alighoj

# Kongresa Temo

## Lingvo, vivo, tero: La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj


**Mark Fettes**, reĝisoro de la Kongresa Temo

Nia ĉi-jara temo omaĝas al la malfermo de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, iniciato de UN kaj Unesko. Esperantistoj plej ofte havas grandan simpation por la klopodoj de malgrandaj popoloj konservi aŭ revivigi siajn lingvojn; ili povas esti mem anoj de tiuj popoloj, aŭ iliaj aktivaj subtenantoj kaj kunbatalantoj. Samtempe, multaj parolantoj de Esperanto havas nur limigitan aŭ tre minimuman konon de la specifaj situacioj de indiĝenaj popoloj, eĉ en la propra lando, por ne paroli pri la vasta gamo de tiaj lingvoj kaj kulturoj tra la mondo.

Tial nia ĉi-jara temprogramo invitas vin al diversspecaj prezentoj kaj diskutoj, per kiuj vi povos ne nur ekkoni kelkajn trajtojn de la indiĝenaj lingvoj de Norda Ameriko, sed ankaŭ aŭdi de kaj pri homoj kiuj mem praktike (kun)laboras por la konservado kaj disvolvado de indiĝenaj lingvoj en diversaj landoj. Ateliero pri la Deklaracio de UN pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj helpos vin kompreni, kiel interligitaj estas lingvaj rajtoj kun aliaj indiĝenaj rajtoj, aparte la rajtoj je la tradiciaj teritorioj, sur kiuj tiuj lingvoj ekestis, kaj kiel ĉiu el ni povas agi solidare kun indiĝenaj movadoj por justeco. Kaj ne mankos okazoj diskuti pri tio, kion ni esperantistoj povas kaj devas lerni de la tradicia saĝo, profundaj ter-orientitaj kulturoj kaj nuntempaj sociaj streboj de niaj indiĝenaj samideanoj.

**Dimanĉo 7 aŭgusto**
*La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj: Enkonduko en la kongresan temon*
(60 minutoj)
Prezidas Mark Fettes, reĝisoro de la kongresa temo
Post enkonduka prezento pri la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, diversaj kontribuantoj al la temsesioj donos etan gustumon de la programo de la venontaj tagoj.

**Lundo 8 aŭgusto**
*Panoramo de indiĝenaj lingvoj en Nord-Ameriko*
(110 minutoj)
La lingvistoj Paul Hopkins, Daniel Stoltzfus kaj Will Norton prezentos kelkajn el la fascinaj trajtoj de kelkaj grandaj familioj de indiĝenaj lingvoj en la kongresa kontinento, interalie la denea, la inuka, la algonkena kaj la irokeza.

**Mardo 9 aŭgusto**
*UN-Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj*
*Prezento kaj Ateliero: Kiel aktivi por indiĝenaj rajtoj?*
(90 minutoj)

Gvidas Mark Fettes, reĝisoro de la kongresa temo

La Deklaracio, konata al multaj aktivuloj kiel UNDRIP, estas la plej grava internacia dokumento pri indiĝenaj rajtoj. Kvankam ĝi ne estas interŝtata traktato kaj do ne estas parto de la internacia juro, ĝi jam forte influas la formuladon kaj interpreton de la nacia juro en pluraj landoj, inkluzive de Kanado. Kiel uzi ĝin en la praktiko? Tion nia ateliero esploros.

*Esperantistoj kaj indiĝenaj lingvoj: Spertoj tra la mondo*

(150 minutoj)

Tra la jardekoj, esperantistoj en multaj landoj montras intereson kaj subtenemon al la lokaj lingvoj, kiujn ili renkontis aŭ foje mem parolas. Ĉi tiu sesio kunigas kvar fascinajn prelegojn pri tiaj spertoj en Brazilo, Alasko, Japanio kaj Nov-Zelando. Prelegas Manuela Burghelea, Will Norton, JOKOJAMA Hirojuki, kaj Stefan MacGill. Fine ni diskutos, kion esperantistoj volas diri al la mondo okaze de la hodiaŭa Internacia Tago de Indiĝenaj Popoloj.

**Vendredo 12 aŭgusto**

*Perspektivoj al lingvolernado kaj lingvorevivigo (1)*

(90 minutoj)

Kiel aspektas la defioj de lingvolernado kaj lingvorevivigo tra la okuloj de indiĝenaj aktivuloj pri tiuj temoj? Kiel lingvaj demandoj interplektiĝas kun demandoj pri identeco, kulturo, edukado kaj la rilatoj al la tero? Kio devas ŝanĝiĝi en la socio, por ke tiuj streboj sukcesu? Kelkaj indiĝenaj gastprelegantoj rakontos pri siaj spertoj kaj perspektivoj pri tiuj demandoj.

*Perspektivoj al lingvolernado kaj lingvorevivigo (2)*

(90 minutoj)

Esperantistoj ja havas siajn proprajn spertojn kaj ideojn pri lingvolernado kaj lingvorevivigo. En ĉi tiu podia diskuto, tri ne-indiĝenaj kanadanoj interŝanĝos siajn pensojn surbaze de siaj diversfakaj aliroj al la temo kaj la diversaj formoj de kunlaboro kun indiĝenaj organizoj kaj komunumoj, en kiuj ili estis plektitaj. Kunparolos Mark Fettes, Jed Meltzer, kaj Daniel Stoltzfus.

# La libroj...

**Libroservo de UEA (salono Eichholz)**

Nemalhavebla parto de ĉiu kongreso estas la libroservo. Ĝi donas okazon al libroamantoj aĉeti la plej freŝajn eldonojn, sed ankaŭ ĝui etoson de librofoiro. Kaj, ne forgesu, ke en la libroservo oni vendas ne nur librojn sed ankaŭ aliajn movadajn produktojn.

*Sabato 1 14:00-18:00; dimanĉo 13:00-18:00;*
*lundo, mardo, ĵaŭdo, vendredo 9:00-18:00; sabato 2 12:00-14:00, Eichholz*

**Aŭtoraj Duonhoroj**

Ĉu vi deziras scii iom pli pri verkistoj kaj iliaj verkoj? Ĉu vi ŝatas pli bone konatiĝi kun ili, scii kiuj ili estas? Kiel ili iĝis verkistoj aŭ tradukistoj de gravaj verkoj? Venu al la libroservo, kie ĉiun tagon okazos renkontiĝoj kun aŭtoroj, kiuj pretos respondi viajn demandojn. La horoj kaj aŭtoroj estos tie anoncitaj kaj en la kongresa kuriero.

**Libroj de la Jaro**

Jen la jam tradicia renkontiĝo, dum kiu eldonistoj prezentos al vi novajn eldonaĵojn! Ne timu, ne temos pri enuiga listo de titoloj, sed oni prezentos la verkojn en plej diversaj kaj amuzaj manieroj, ĉu deklamado, ĉu intervjuo kun la verkinto… Venu, sekvu bone, notu la plej interesajn titolojn kaj tuj poste vizitu la libroservon, kie vi povos foliumi kaj… eĉ aĉeti la prezentitajn verkojn.

*Vendredo 13:15-14:00, Saint-Martin*

# Unuafojaj kongresanoj

Ĉu tiu ĉi estas via unua (aŭ dua, tria) Universala Kongreso? Jen la ĝusta kunsido por vi!

Kiuj estas la celoj de la Universalaj Kongresoj? Kiel plene ĝui ilin? Kiel uzi la Kongresan Libron? Kio estas Movada Foiro, Nacia Vespero? Ĉu mi rajtas eniri en iun ajn salonon? Kio estas la Kongresa Kuriero?

Dum tiu ĉi kunsido oni ricevos respondojn al la supraj demandoj kaj al aliaj faritaj de la publiko dum la renkontiĝo.

*Sabato 1 15:00-16:00, Saint-Martin*

# Movada Foiro

En la Esperanto-movado estas centoj da asocioj grandaj kaj malgrandaj: landaj asocioj, fakaj asocioj, kulturaj centroj, eldonejoj, edukaj instancoj kaj multaj aliaj. Dum la ĉi-jara Movada Foiro, dekoj da asocioj prezentos sian agadon per afiŝoj, informiloj, eldonaĵoj, fotoj kaj filmetoj, por doni impreson pri la vasteco kaj vario de nia movado.

*Sabato 1 19:00-21:00, halo Durette (Agora) - vidu p. 9*

Retejo por Aktivuloj
EKO / AMO / Ni semas / Gvidiloj / FLAM

Vizitu la paĝaron de UEA

**Aktivulo.net**

por trovi la Agadajn Raportojn, Gvidilojn por Aktivuloj, informojn pri Aktivula Maturigo, FLAM-analizoj, la programo Ni semas, Landa Agado kaj multo alia.



# Informado kaj komunikado

**Kongresa Kuriero**

La *Kongresa Sciulo* estas grava ĉiutaga informilo pri ĉiuj aktualaĵoj de la kongreso. Legu ĝin por trovi informojn pri ĉiuj programŝanĝoj, raportoj pri pasintaj kaj anoncoj de venontaj eventoj. Ĝi helpas vin pli bone orientiĝi kaj pli agrable kongresi. Unuvorte, ĝi klopodas esti nia vera gazeto dumkongresa. La redakcio invitas ankaŭ vin kontribui. Precipe tiuj, kiuj respondecas pri iu faka aŭ alia kunsido, ne forgesu raporti pri ĝi tuj post la kunsido. Redaktoro: Sylvain Auclair jrsylvain.auclair@gmail.com.

Kongresa Sciulo

Kongresa Kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto

Pri ĉiuj programŝanĝoj informu la Kongresan Kurieron kaj ukprogramo@ikso.net por ke la programtabelo de la kongreso estu ankaŭ ĝisdata en la programa apo (aplikaĵo).

Ĉiuj numeroj de La Kongresa Sciulo estos haveblaj en la retejo de UEA: https://uea.org/kongresoj.

**Programa apo**

Por faciligi vian dumkongresan vivon en Montrealo, prepariĝis unuafoje speciala aplikaĵo poŝtelefona por la UK. Ĝi enhavas plurajn utilajn funkciojn kaj informojn, kiuj povus esti uzataj de ĉiuj kongresanoj, kiuj uzas aptelefonon (smartphone).

En la apo vi trovos iom pli da detaloj ol en la kongresa libro - kien ne eniris ĉio pro diversaj kialoj. Aldone - la apon eblas rapide kaj facile aktualigi - do konsulti programon en ĝi estas certe pli avantaĝe, ĝisdate. Sed ni eble ne devas prezenti la apon detale ĉi tie - la sistemo estas tre uzant-amika kaj vi povas mem malkovri ĉiujn erojn de ĝi. Antaŭ la kongreso vi ricevis retmesaĝon kun la detaloj rilataj la apon. Por eniri la apon eĉ ne necesas elŝutado, sufiĉas "malfermi" (klaki) jenan ligilon: https://uk2022.esperanto.net. Por eniri la apon, bv. uzi vian retadreson, pere de kiu vi registriĝis por la ĉi-jara UK. Se vi bezonus aldonan helpon pri la apo, bv. veni al la informejo dum la UK.

**Aliaj komunikiloj**

Facebook, Twitter, Instagram: afiŝu ĉiujn fotojn de la kongreso markante ilin *#esperanto2022* por ke aliaj povu sekvi la kongreson en sociaj retoj.

Telegram: UK 2022 (https://mallonge.net/2022).

Komuna fotoalbumo (https://mallonge.net/fotoj2022): bonvolu aldoni viajn fotojn tien!

# KOVIM-19

Kion fari se vi havas simptomojn de KOVIM-19:

- Restu en via ĉambro.
- Kontaktu la informejon de la kongreso retpoŝte: helpodumuk@ikso.net aŭ telefone: 1-514-250-2842.
- Informu nepre vian kunloĝantojn, se vi ne loĝas sola.

La informejo povas disponigi KOVIM-rapidteston kaj/aŭ la eblon konsulti Esperanto-parolantan kuraciston.

Kiuj estas la simptomoj de KOVIM-19?

Unu (1) el la sekvontaj:

- febro
- subita perdo de flarsenso
- tuso (nova aŭ plimalboniĝinta)
- spirmanko
- gorĝdoloro

Du (2) el la sekvontaj:

- flunazo aŭ naza ŝtopiĝo de nekonata kaŭzo
- kapdoloro
- granda laceco
- ĝeneraligita muskola doloro (ne rilata al fizika fortostreĉo)
- grava perdo de apetito
- naŭzo aŭ vomado
- stomakdoloroj
- diareo

**Maskoj:**

UEA kaj la LKK rekomendas al kongresanoj porti maskojn, dum oni estas interne. Tio validas ĉefe por pli aĝaj homoj, eventuale personoj kun pli alta risko je seriozaj postsekvoj de Kovim-19.



# Kleriga lundo

En la jaro 2003, okaze de la UK en Gotenburgo, la estraro de UEA enkondukis novan programeron "kleriga lundo", serion da seminarietoj kiuj donos eblojn kaj por lerni kaj por paroli pri plej diversj temoj Esperantaj kaj ne-Esperantaj kiel komunikado, kulturo, movado ktp.

Ili celas ne nur kapti vian atenton, sed ankaŭ instigi vin al aktiva partopreno. Reagu pri la prezentotaj ideoj, diskutu ilin, proponu viajn solvojn al problemoj aŭ eĉ tute konkrete partoprenu en realigo de la tasko.

La celo ne estas donaci jam bakitan kukon, eĉ se ĝi estas bonega, sed ke la partoprenantoj kunkuiru la tuton en gaja kaj kunlaborema etoso.

En Montrealo do okazos jam la 20-a kleriga lundo, kiu proponos al vi naŭ seminariojn, kies enhavo estas plej diversa: ekde la tradiciaj pri la KER-ekzamenoj kaj UN, al tute interesaj, kiel la historio de la sekretario de Tolstoj, kiu devis lerni Esperanton por respondi al alvenintaj leteroj; aŭ tute aktualaj, kiel la nuna situacio de Irako, aŭ iom amuzaj, kiel la sekretoj de la kanada viskio.

Jen la skemo:

**Lapenna**

| | |
|---|---|
| 09:00-10:30 | Renée Triolle: Victor Lebrun, modesta pensanto, sekretario de Tolstoj |
| 10:45-12:15 | Humphrey Tonkin: Multlingvismo kaj UN: kiu strategio por Esperanto? |
| 12:30-14:00 | Thomas Bormann: Irako ĉu kolapsanta ŝtato? |

**Nourmont**

| | |
|---|---|
| 09:00-10:30 | Sylvain Lelarge: Renkontiĝo kun bestoj |
| 10:45-12:15 | Katalin Kováts: Preparseminario por la KER-ekzamenoj |
| 12:30-14:00 | Raymond Brisebois: La homaranismo de d-ro Zamenhof |

**Solis**

| | |
|---|---|
| 09:00-10:30 | Kristin Tytgat: Kiel mi ploras |
| 10:45-12:15 | Javier Alcalde: Kiel fari esploradon pri Esperanto-historio |
| 12:30-14:00 | Jimmy Stryhn Meyer: La kanada viskio |

# Kunsidoj de UEA-instancoj

**Komitato de UEA**

La Komitato estas la supera organo de UEA, kiu konsistas el reprezentantoj de landaj kaj fakaj asocioj kaj de individuaj membroj. Ĝi decidas pri la gvidlinioj de la agado de UEA kaj elektas la Estraron k.a. ĉefajn organojn de la Asocio.

Dum tiu ĉi UK la Komitato kunsidos kvarfoje. La unua kunsido, sabaton la 6-an de aŭgusto, estos dediĉita al la diversaj elektoj (Estraro, komisionoj, reviziantoj). La dua dimanĉe, al la diskuto kaj decido pri la Estrara Raporto 2021. La tria kunsido, lundon, servos kiel forumo pri la Strategia Laborplanado. La kvara kunsido, vendredon, temos pri la diskutado kaj decidado rilate al la komitataj forumoj (vidu liston ĉi-sube), kiuj disvolviĝos en Montrealo dum la UK. Ĉiuj kunsidoj estos publikaj.

*Sabato 1 14:00-17:30, Dimanĉo 16:00-17:30,*
*Lundo 14:00-18:00, Vendredo 9:00-12:30, Hodler*

**UEA respondas**

En tiu ĉi programero sin prezentos la nova Estraro de UEA por la periodo 2022-2025. Vi konatiĝos kun la membroj de Estraro kaj ankaŭ aŭdos pri la lastaj evoluoj en UEA prezentitaj en la Estrara Raporto 2021. Ankaŭ ĉeestos la Ĝenerala Direktoro kaj aliaj kunlaborantoj de UEA. Temas pri konversacia aranĝo, en kiu ĉiu ajn kongresano rajtos libere prezenti demandojn, komentojn kaj proponojn rekte al la estraranoj, al la Ĝenerala Direktoro kaj kolegoj. Kiel UEA povas helpi vin? Kiel vi mem povas kontribui al ĝia pli glata funkciado? Jen do okazo por ekscii kaj kompreni strategiajn kaj praktikajn aferojn pri nia tutmonda asocio.

*Mardo 14:45-16:15, Lapenna*

**Komitataj Forumoj**

La Komitato de UEA kunsidas en sia plena konsisto la unuan sabaton, dimanĉon, lundon kaj vendredon. Kaj inter tiuj kunsidoj okazas ankaŭ la Komitataj Forumoj, serio de kunsidoj por pritrakti strategiajn agadojn, kiujn plenumu UEA sur la kvar agadkampoj de la Strategia Laborplano de la Asocio, nome Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigo. Ĉiuj kongresanoj, ne nur komitatanoj, rajtas partopreni, fari demandojn kaj proponojn kaj aliĝi al la planataj agadoj. Jen la kvar forumoj en la ordo de disvolviĝo:

- **Komitata Forumo pri Konsciigo**

Traktas pri agadoj por informado pri Esperanto kaj eksteraj rilatoj (UN, Unesko kaj rilatoj kun neesperantistaj organizoj).

*Mardo 09:00-10:30, Hodler*

• **Komitata Forumo pri Kapabligo**

Traktas pri agadoj pri instruado, rilatoj kun ILEI, Edukado.net, Akademio de Esperanto, universitatoj, instruista kaj aktivula trejnado, esploro kaj dokumentado kaj agadoj ĉirkaŭ CED kaj la Speciala Katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko de la Universitato de Amsterdamo.

*Mardo 13:00-14:30, Hodler*

• **Komitata Forumo pri Komunumo**

Traktas pri la agado de UEA por membroj kaj esperantistoj, eventoj kiel la Malfermaj Tagoj kaj la UK, krom aliaj eventoj, kiujn UEA povas iumaniere subteni (kiel SES, SEP, KAEST, NASK, por poliglotoj ktp.), landa agado (kunlabore kun landaj asocioj kaj regionaj komisionoj), faka kaj scienca agado, kultura agado kaj rilatoj kun Esperanto-kulturcentroj kaj ĝemelaj urboj.

*Ĵaŭdo 09:00-10:30, Hodler*

• **Komitata Forumo pri Kunordigo**

Traktas la agadon en UEA pri ĝiaj instancoj kaj ties funkciado (Komitato, Estraro, oficejoj, Kongresa Fako, Libroservo, Biblioteko Hodler), pri financoj (i.a. buĝeto 2023), membrovarbado, servoj (i.a. revuoj), rilatoj kun TEJO kaj ĝenerala strategio por funkciigo de la Asocio.

*Ĵaŭdo 16:30-18:00, Hodler*

Alianco 365 estas plano por monata konstanta donacado al UEA. La celo de la plano estas garantii al nia Asocio financan ekvilibron, kontribuante por pozitiva jara rezulto, kio signifas daŭripove ebligi al UEA plenumi sian mision. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 EUR monate al la Asocio, kio egalas donaci po nur 1 EUR tage. Alternative donacantoj povas fari unufojan donacon de 365 EUR por la kuranta jaro.

## Kiel donaci?

**Per banko:**

UEA-konto en
ING Bank,
Postbus 1800,
NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A)

Per Paypal: vidu detalajn instrukciojn ĉe la Reta Revuo – https://revuoesperanto.org/alianco_365.

# Prelegoj pri Kanado

Prelego pri Kanado 1: **Historio de Kebekio kaj Kanado antaŭ 1867** (Sylvain Auclair)

Oni ofte legas, ke Kanado kreiĝis en 1867, sed setlantoj el Eŭropo vivas laŭ la riverego Sankta Laŭrenco ekde 1608. Ni rapide vidos la kreon kaj disvolviĝon de tiu Nova Francio kaj ĝiajn rilatojn kun indiĝenoj kaj niaj anglaj najbaroj kaj la nekvietan historion de la angla kolonio Kanado dum jarcento ĝis 1867.

*Dimanĉo 14:00-14:45, Solis*

Prelego pri Kanado 2: **La angla lingvo en Kanado** (Paul Hopkins)

La anglan lingvon oni parolas en Kanado jam de pli ol 400 jaroj, unue en la teritorio de la ĉe-maraj provincoj kie ankoraŭ hodiaŭ - unuavice en Novlando - uziĝas apartaj dialektoj de la angla, kaj poste en Ontario kaj sudokcidenta Kebekio, kie alvenis multnombraj anglalingvanoj de la usonaj kolonioj post la usona Milito de Sendependiĝo. Surbaze de la parolformoj de ĉi-lastaj kreiĝis la angla dialekto nun parolata pli-malpli unuece en la tuta Kanado okcidente de Kebekio: oni nomas ĝin la kanada angla. Tiu ĉi prelego prezentos la trajtojn kiuj diferencigas la kanadan anglan de la aliaj dialektoj de la angla kaj instruos kelkajn trajtojn de elparolo kaj vorttrezoro per kiuj oni povas rekoni parolanton de la kanada angla.

*Dimanĉo 16:15-17:00, Solis*

Prelego pri Kanado 3: **Kanadaj Zamenhofoj** (Ĵenja Amis)

Ĉu vi sciis, ke la onklino de Zamenhof, en kies domo estis kantita la pra-Esperanta himno, enmigris Kanadon kaj bonvenigis la Majstron en 1910 dum la amerika vizito? Venu informiĝi pri tio kaj pri aliaj Zamenhofoj, kiuj loĝis en Kanado dum la tempo de lia vizito en 1910!

*Lundo 15:15-16:15, Solis*

Prelego pri Kanado 4: **La franca lingvo en Kebekio, kultura aspekto** (Sylvain Auclair)

Longe izolita kaj endanĝerigita, la franca lingvo sukcesis plu vivi en Kanado, ĉefe en Kebekio. Ni rapide vidos kiel ĝi evoluis inter arĥaismoj kaj anglismoj, kiel estis traktitaj la francparolantoj, kaj la leĝajn aranĝojn por protekti kaj evoluigi la uzon de la franca. Estos fine prezentitaj kelkaj lingvaj apartaĵoj.

*Ĵaŭdo 09:15-10:00, Solis*

Prelego pri Kanado 5: **Lumo: unua Esperanto-revuo Amerika** (Geoffrey Greatrex)

Meritas festiĝi 120 jaroj da ekzisto de la plej frua E-lingva revuo en Norda Ameriko, eĉ se komence ĝi eldonis artikolojn ankaŭ en la angla kaj la franca. Ni esperas montri kelkajn erojn el la revuo kaj aŭdi kontribuojn de pluraj iamaj redaktoroj de ĝi.

*Ĵaŭdo 10:30-11:30, Solis*

Prelego pri Kanado 6: **Mallonga historio de Kanado** (Joel Amis)

Superrigardo de la kanada historio ekde ĝia konfederiĝo en 1867.

*Ĵaŭdo 16:45-17:45, Solis*

Prelego pri Kanado 7: **Diverslingva muziko en Kanado** (Eduardo Berdor)

Ateliera prelego pri muziko en Kanado — ĉefe temos pri franclingva muziko en Kebekio.

*Vendredo 09:45-10:45, Solis*

Prelego pri Kanado 8: **Kanada kaj Kebekia lingvopolitiko** (Nicolas Viau)

Lingvoj - kaj aparte la statuso de la franca lingvo - kaj de iliaj parolantoj (grandparte, sed ne nur) - estas kernaj en kanadaj historio, politiko kaj identeco. Dum ĉi tiu prelego ni skize esploros la bazajn faktojn rilate la historion kaj nunan staton de politikoj kaj sintenoj rilate la oficialajn lingvojn de Kanado - la anglan kaj la francan - kun aparta emfazo pri la situacio de la franca lingvo en Kebekio kaj ties lingvajn politikojn.

*Vendredo 11:00-12:00, Solis*


Prelego pri Kanado 9: **Malantaŭ la teatraĵo "1910"** (Ĵenja Amis)

En 1910 Zamenhof vizitis Amerikon. Tio estis lia unua kaj la sola vojaĝo ekster Eŭropon. Eksciu pli precize pri tio, kie li vivis, kion li vizitis, kaj pri la persono, kiu akompanis lin - William Mann. Spektu ankaŭ la teatraĵon "1910". La prelego kompletigas la teatraĵon kaj donas plurajn kromajn informojn pri la vizito.

*Vendredo 13:30-14:30, Solis*

# Lingvaj kursoj

Ni estas ĝojaj proponi al la ĉeestantoj la bazajn lecionojn pri la loka lingvo: la franca – la ĉefa lingvo en Montrealo. La celo estas helpi babili pri simplaj ĉiutagaĵoj. Aldone al tio, ni proponas la ekspres-kurson pri loka indiĝena lingvo: la aniŝinabeka (Ojibwe). Oni parolas la aniŝinabekan en sud-okcidenta Kebekio (plus ankaŭ en Ontario kaj kelkaj aliaj provincoj de Kanado).



## Kotizu jam por 2023!

Ĉe la giĉeto de la kasisto de UEA eblas pagi membrokotizon de UEA/TEJO por 2023 laŭ la ĉi-jara tarifo.

# Prelegoj Ĝeneralaj

**ESF: Ĝisdatigo** (Charles Mays)

Esperantic Studies Foundation estas unu el la plej gravaj nuntempaj Esperanto-organizoj. Venu informiĝi pri ESF!

*Dimanĉo 17:00-18:00, Nourmont*

**Imperiestro Juliano, Ibsen kaj operaco Barbarossa** (Geoffrey Greatrex)

Prelego pri paraleloj inter la orienta kampanjo de la romia imperiestro Juliano (361-363) kaj la germana invado de Sovetunio en 1941. Oni kritikos la ideon ke la dramo de Henrik Ibsen *Imperiestro kaj galileano*, forte influis ĉiujn aspektojn de la germana strategio. Ĉiuj estas bonvenaj.

*Dimanĉo 16:00-17:00, Beauchemin*

**Ekskurso tra vakuo kaj malfinio** (François Lorrain)

Ekskurso tra vakuo kaj malfinio — enkonduko en modernan matematikon por nematematikistoj. Arteorio sen peno. Kiel vakuo naskas malfinion. La nombro nul: pli ol du mil jaroj da historio. La nulo kaj Esperanto. Paradoksoj pri malfinio. Famaj studintoj de malfinio. Kelkaj amuzaj paradoksoj.

*Ĵaŭdo 16:00-16:45, Nourmont*

**Eduardo Vivancos (1920-2020): Esperanta Legendo** (Javier Alcalde)

"En Esperantujo ni ofte parolas pri junuloj, sed ni ne forgesu la maljunulojn, kiuj konstruis la movadon kaj komunumon, kiujn ni ĝuas hodiaŭ", skribis en 2017 nia karmemora Mateo Chisholm, el Toronto, pri Eduardo Vivancos (foje esperantigita Vivankos). 97-jara Eduardo estis honorita pro elstara agado dum la ferma ceremonio de la UK en Seulo kaj ankaŭ dum la SAT-kongreso de Barcelono en 2019. Naskiĝinta en tiu urbo en 1920, li esperantistiĝis en 1936. Li partoprenis la Hispanan Intercivitanan Militon kaj eĉ instruis Esperanton al siaj kamaradoj en la fronto, antaŭ posta ekziliĝo en la koncentrejoj en Francio kaj fine translokiĝo al Toronto en 1954. Surbaze de verkata biografio, ĉi tiu prelego celas konatigi pli novajn samideanojn kun Esperanta legendo.

*Lundo 14:15-15:15, Nourmont*

**La arto kaj la praktiko en konstruitaj lingvoj – de la praktikeco al la fantazio kaj reen** (James Hopkins)

James E. Hopkins, longdaŭra Esperantisto kaj artlingvisto, diskutos la rolojn de arto, praktikeco, fantazio kaj estetiko en la kampo de kreitaj lingvoj internacia kaj arta, kaj kiel li, dum multaj jaroj, partoprenas en ambaŭ. JEH lernis Esperanton en 1966 kaj tiun lingvon li rapide ekamis. Poste, li studis kaj diplomiĝis pri la francaj lingvo kaj literaturo en la Universitato Hofstra, Novjorko, Usono. En 1980 li malkovris la mondon de 'kons-

truitaj lingvoj' per la elfaj lingvoj de Tolkien, la klingona de Marc Okrand kaj en 1996, la Alurhsa de Anthony Harris. En 1997 li komencis labori pri sia propra kreata lingvo, la itlana. Li estas membro de la Language Creation Society kaj servis en ĝia Direktoraro.

*Lundo 16:45-17:45, Lapenna*

**La arto de desegnado** (Jonathan Cooper)

Desegnado estas natura agado. Tuj post kiam ni eksciis kiel infanoj, ke ni povas fari markojn sur diversaj surfacoj, ni tion faris. Tamen, se ĝi ja estas natura, kaj io, kion preskaŭ ĉiu infano faras, kial plejparto de ni ne praktikas ĝin kiel plenkreskuloj? Bedaŭrinde, nur malgranda elcento da plenkreskuloj kredas, ke ili povas desegni, kaj tial desegnas. Tamen, kiel tiu mallonga prelego espereble pruvos, desegnado estas grava praktiko por ĉiuj. Jonathan Cooper estas sendependa verkisto, prelegisto kaj retejo-adminstranto (doctordada.com/eo). Dum pli ol 30 jaroj, li laboris ĉe la la ĉefa art-muzeo en Sidnejo, Aŭstralio, kiel muzea klerigisto. Li estas vic-prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la ŝtata Esperanto-organizaĵo Esperanto NSW.

*Ĵaŭdo 13:30-14:00, Beauchemin*

**La psikologio de falsaj novaĵoj: kiel protekti sin kontraŭ la influo de misinformoj** (Rakoen Maertens)

Ni vivas en mondo kun ne nur pandemio, sed ankaŭ infodemio. Sed kio estas la influo de falsaj novaĵoj en nia komunumo, kaj kiel oni povas protekti sin kontraŭ ili? El la perspektivo de psikologio, mi klarigas kiel misinformoj influas la pensojn kaj kondutojn de homoj. Poste, mi montras kiel oni povas preventi la influon kaj protekti homojn, ilustrante kelkajn novajn intervenojn kiujn ni kreis ĉe la Universitato de Kembriĝo. Fine, mi diskutas la eblajn problemojn rilate al monda paco, kaj eblan rolon de Esperantujo en la batalo kontraŭ misinformoj.

*Ĵaŭdo 09:00-10:00, Nourmont*

**Paralela Universo – La spertoj ĝis nun, kaj la estonteco** (Jed Meltzer)

Paralela Universo estas unutaga festo de Esperanto, okazanta en diversaj lokoj samtempe. Ĝi estas klopodo fortigi lokajn klubojn tra la mondo, kaj doni al novuloj la oportunon paroli la lingvon vizaĝ-al-vizaĝe sen vojaĝi tre for. Ĝi estas organizata de voluntuloj en diversaj lokoj, kaj kutime inkluzivas grupan manĝadon en restoracio, kaj vizito al turismaj vidindaĵoj. Ĝi okazas la trian sabaton de aŭgusto ĉiujare, ekde 2016. En 2019, partoprenis pli ol 200 esperantistoj en pli ol 30 apartaj eventoj, en pli ol 10 landoj, en grupoj je grandecoj de 2 ĝis 30 partoprenantoj. Nun en la 5-a jaro de la projekto, estas bona oportuno retrorigardi la spertojn de la pasintaj kvar jarojn, kaj disktuti la estontecon de Paralela Universo. Ni diskutos: Kion vi plej ĝuis pri la evento? Kion vi ŝanĝus? Kiel ni povas kreskigi la aferon pli vaste kaj rapide? Ĉu PU havas pli grandan celon krom la daŭrigo de si mem?

*Ĵaŭdo 15:15-15:45, Nourmont*

**Esperanto kaj anarkiismo: kiam, kie, kiel, kial?** (Javier Alcalde)

Esplorinte diversajn fontojn, foje malmulte konatajn, mi pritraktos la debatojn, kiujn la ebleco de lingvo internacia vekis en la socialismaj rondoj antaŭ la Granda Milito, kun speciala atento al la akcepto kiun ĝi havis inter la diversaj anarkiismaj tendencoj. La prelego ekos per analizo de utopiaj socialistoj (iusence praanarkiistoj kaj praesperantistoj) kaj daŭrigos kronologie ĝis 1907, dudek jarojn post la apero de la Unua Libro; multo okazis en tiu jaro, en pluraj mondopartoj. Fine ni diskutos malsamajn interesajn ekzemplojn de la anarkiisma esperantismo en postaj momentoj de la historio kaj klopodos kunpensi la estontecon de tiu rilato.

*Vendredo 11:00-12:00, Nourmont*


**Tokipono: la simpla lingvo** (Sonja Lang)

Kun miloj da aktivaj parolantoj, Tokipono lastatempe iĝis la plej populara planlingvo en la Interreto post Esperanto. Tokipono estas lingvo kun nur 123 vortoj, kiuj simpligas ideojn al bazaj elementoj. "Soifi" estas "voli manĝi akvon". Instrui estas "doni scion". Renkontu Sonja Lang, la kreintinon de Tokipono.

*Vendredo, 12:00-12:30, Saint-Martin*




**Ulrich Lins.**
**Nova, plene reviziita historio pri la atakoj kontraŭ la E-movado, precipe sub Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en la cara Ruslando kaj la orienta Azio.**
**375+24 paĝoj, 19 cm. UEA, Rotterdam, 2016. Prezo ĉe UEA: 18,00 €**




## Zamenhof en Varsovio

**Roman Dobrzyński.**
**Libro, unue aperinta en la pola, publikigita okaze de la centjariĝo de la morto de Zamenhof.**
**160 paĝoj, 21 cm. UEA, Rotterdam, 2016.**
**Prezo ĉe UEA: 9,90 €,**

# Ekumena Diservo



Tradicia ekumena diservo en Esperanto (kun viva orgenmuziko): ĉiuj bonvenas.

Sekvos ekumena anglikan-luterana meso: ĉiuj bonvenas!

Por atingi la lokon eliru el la ĉefa konstruaĵo kaj iru laŭ la strato Sainte-Catherine en la sama direkto, kie estas la teatro (okcidenten), ĝis la metrostacio McGill al la adreso: 635 Saint-Catherine St W, Montreal, Quebec H3A 2B8.

*Dimanĉo 15:30- 17:00, Preĝejo: Christ Church Cathedral*

# Lingvaj kursoj kaj ekzamenoj

## KER-ekzamenoj de UEA je kvar niveloj

UEA denove okazigas dum la kongreso ekzamenojn, bazitajn je la Komuna Eŭropa Referenckadro. Estos ekzamenoj je la jam konataj niveloj: B1, B2 kaj C1, kaj en Montrealo debutas la nova, plej alta ekzamennivelo: C2.

Je ĉiu nivelo okazos skribaj kaj parolaj ekzamenpartoj. Parolaj ekzamenoj konsistas el aŭdkomprenaj taskoj kaj antaŭkomisionaj, individuaj ekzamenoj. Dum la UK ĉiu povas trapasi ekzamenon nur je unu nivelo, aŭ en ambaŭ partoj (skriba kaj parola, tion ni nomas KOMPLEKSA EKZAMENO), aŭ nur en la SKRIBA aŭ nur en la PAROLA ekzameno.

La priskribo de la enhavo kaj la postularo pri la unuopaj ekzamenniveloj konsulteblas en la ekzamenpaĝo de edukado.net.

**La ĉefaj ekzamentagoj estos**

- **la 9-a de aŭgusto** (por individuaj parolaj partoj) kaj
- **la 12-a de aŭgusto** (por la skriba kaj aŭdkomprenaj partoj).

Por la individuaj ekzamenpartoj eblas elekti tempon post la aliĝo, rete aŭ en la unuaj tagoj de UK surloke, sed konsciu, ke la ebloj estas limigitaj.

Interesiĝantoj povas peti ekzamenspecimenojn ĉe www.edukado.net. Pliajn informojn (aliĝilo, postuloj, prezoj, statistiko ktp) legu ĉe:

- http://edukado.net/ekzamenoj/ker ĝenerale;
- https://edukado.net/ekzamenoj/ker/uk rekte pri informoj por la montreala sesio;
- aŭ skribu al ker-ekzamenoj@edukado.net.

Aliĝi necesas antaŭ la ekzameno, ĝis la 9-a de aŭgusto, mardo, noktomezo.

La ekzamenkotizoj varias laŭ la landkategorioj de la membrokotizoj de UEA. La kotizo antaŭpageblas prefere per ĝiro al la UEA-konto aŭ surloke ĉe la kongresa kaso.

En la programo de la *Kleriga Lundo* Katalin Kováts, organizanto de la ekzamenoj okazigos informprogramon pri la sesioj, dum kiu eblos vidi specimenojn, ricevi konsilojn kaj starigi demandojn.

| **Dato** | **Loka tempo** | **Niveloj kaj tipoj** | **Aranĝo, temo** |
|---|---|---|---|
| 8-a de aŭg. lundo | 10:45-12:15 | ĉiuj niveloj | Kleriga Lundo<br>KER-seminario |
| 9-a de aŭg. mardo | 14:00-21:00 | ĉiuj niveloj* | Parolaj antaŭkomisionaj individuaj ekzamenoj (20-25-minutaj, sed por C2 unuhora)* |
| 12-a de aŭg. vendredo | 09:00-09:45 | C1 | Aŭskulta kompreno* |
| | 09:55-11:30 | C2 | Aŭskulta kompreno* |
| | 11:30-12:15 | B2 | Aŭskulta kompreno* |
| | 12:30-13:15 | B1 | Aŭskulta kompreno* |
| | 14:00-16:00 | B1 | Skriba testo** |
| | 14:00-17:00 | B2 | Skriba testo** |
| | 14:00-18:00 | C1 | Skriba testo** |
| | 14:00-17:30 | C2 | Skriba testo** |

Rimarkoj:

* la parton aŭskulta kompreno devas partopreni ĉiuj, kiuj aliĝis al la kompleksa aŭ nur al la parola tipo de la koncerna nivelo

** la parton skriba testo devas partopreni ĉiuj, kiuj aliĝis al la kompleksa aŭ nur al la skriba tipo de la koncerna nivelo

## Paroligaj kursoj kun edukado.net

La porinstruista retejo edukado.net denove gvidos du paralelajn paroligajn kursojn — dum kvar tagoj de la semajno. La lecionoj de la unua grupo estos mallonga kurso por komencantoj kaj komencintoj (A1, A2). Du lecionoj estos kune, en la daŭro de 90 minutoj. Por la kurso ni uzos la libreton *Poŝamiko*, kiun vi aĉetu en la libroservo aŭ ĝuste antaŭ la kurso. La ĉeestintoj de ĉiuj ok lecionoj ricevos fine atestilon pri la partopreno. Observantoj bonvenas.

Por la meznivelaj (B1, B2) parolantoj de Esperanto estos same ok lecionoj, sed laŭtage la sinsekvaj sesioj estos ripetoj, do, sufiĉos partopreni tage nur unu lecionon (de 45 minutoj), entute kvar fojojn en la semajno.

La kursojn por komencantoj gvidos Katalin Kováts kaj por la alia grupo Sylvain Lelarge. Antaŭa aliĝo al la lecionoj ne necesas.

# Esperantologia Konferenco

## Kio estas la Esperantologiaj Konferencoj (EK)?

La EK reliefiĝas ekde 1978 kiel la plej grava forumo kie fakuloj, studentoj kaj scivolemuloj povas diskuti kaj kunesplori pri ĉiuj fenomenoj rilataj al esperantologio, interlingvistiko, internacia komunikado kaj lingva (mis)kompreno. La EKoj okazas kadre la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kaj ilia programo inkluzivas prelegojn, afiŝprezentojn kaj malfermajn rondajn tablojn. La ĉefaj celoj de la EK estas krei kunlaboreman spacon kaj stimuli originalajn alirojn al la pritraktataj temoj. Ĉiujare la konferenco havas kernan temon, sed alitemaj prelegoj estas bonvenaj. Uzante Esperanton kiel laborlingvon, la EK krome rolas kiel klerigejo por esperantistoj kaj fonto de ideoj, artikoloj kaj raportoj por la Esperanto-komunumo.

Sub la aŭspicio de CED, la EKon iniciatis Detlev Blanke, kaj ilian daŭron ebligis Christer Kiselman, Mélanie Maradan, Orlando Raola, Humphrey Tonkin kaj Guilherme Fians. La aktoj de kelkaj konferencoj estas mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA. Elektitaj kontribuoj el EKoj post 2014 aperas regule en la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*.

## 44a Esperantologia Konferenco de CED

**CED 70-jara: Bilanco pri la kontribuoj de esperantologio al sociaj, politikaj kaj lingvistikaj fakdebatoj**

Sub la aŭspicio de CED, la ĉi-jara konferenco okazos aŭguste en la Universitato de Kebekio en Montrealo, kadre de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto. La organizantoj bonvenigas ĉiujn ĉeesti la prelegojn kaj partopreni la publikan debaton en la 11-a de aŭgusto, krom kontribui al la publika kunsido de CED en la 8-a de aŭgusto.

La konferenca temo festas la 70-jariĝon de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj. Dum tiuj jardekoj, dekoj da esploristoj estis subvenciataj de CED kaj pluraj aliaj kontribuis al niaj konferencoj kaj publikaĵoj. Tamen, kio ŝanĝiĝis en Esperantologio kaj Interlingvistiko intertempe? Kiaj estis la teoriaj kaj analizaj kontribuoj de Esperantologio al Lingvistiko kaj aliaj studkampoj?

La konferenco okazos en tri partoj:

1) festsesio honore al la 70-jariĝo de CED;

2) du sesioj pri prelegoj kaj referaĵoj;

3) publika debato/ronda tablo, malferma al ĉiuj, pri la akcepto (aŭ malakcepto) de Esperanto kiel studobjekto de la sciencoj.

Ĉiuj partoprenantoj de la Universala Kongreso rajtas ĉeesti.

Pli detalan programon de la konferenco bv. vidi ĉe: https://mallonge.net/espkonf2022.

*Ĵaŭdo 09:00-18:00, Zaleski-Zamenhof*

# Kongresa Aŭkcio

Nepre partoprenu la aŭkcion en vendredo. Ĝi fariĝis unu el la spektakloj de la kongresa semajno – kaj ankaŭ maniero kolekti monon por utila celo, nome la Volontula Fondaĵo de UEA.

Oni proponos librojn k.a. objektojn por la aŭkcio donacitajn de la Libroservo de UEA kaj de individuaj esperantistoj. Inter ili estas ĉefe libroj, eĉ tre raraj eroj el la fruaj jaroj kaj diversaj esperantaĵoj. Speciala aŭkciaĵo estos la kongresnumero 1 de la 108-a UK en Torino.

*Vendredo 16:00-16:45, Lapenna*



# Tago de Lernado

**Temo:** Instruado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj kaj regionoj
**Subtemo:** Pandemiaj spertoj kaj postpandemiaj tendencoj en instruado

Tradicia programero de la UK-oj, la Tago de Lernado ankaŭ ĉi-jare prezentos aron da prelegoj. Post ioma gustumado de la eduksistemo de la gastiganta regiono, ni koncentriĝos al temoj proksimaj al la temo de la UK mem. Tamen ni ne povas preterlasi ion kio forte influis nian ĉiutagan vivon dum la lastaj du jaroj. Jes, la pandemio ŝanĝis nian vivon, alportis plurajn negativaĵojn, sed same donis eblon por iuj novaj spertoj, ankaŭ kadre de E-ujo.

Kaj fine, sed ne malpli grave: KER-ekzamenoj, kiuj estas vere granda defio!

Por fini etan prezenton, ni atentigas vin pri nur unu interesaĵo. Niaj prelegantoj estis elektitaj pro siaj fakaj spertoj, sed ĉe plimulto ni povas konstati interesan koincidon: ligon al pli ol unu lingvo, kulturo kaj regiono (Usono/Britio, Kanado/Kroatio, Usono/Kubo, Koreio/Brazilo, Nederlando/Hungario).

*Mardo, 09:00-14:00, Lapenna*

## Programo

09.00-09.10: Salutoj
09.10-10.00: Zdravka Metz (Kanado): Eduka sistemo en Kebekio
10.00-11.00: Duncan Charters (Usono): Ĝenerala enkonduko al la temo - Interkultura Kompetento; Kiel plani por la estonta instruado de Esperanto al pli vasta lernantaro
11.00-11.30: Katalin Kováts (Nederlando/Hungario): KER-Ekzamenoj tutmonde, ĉu ankaŭ ĉe vi?
11.30-12.00: Orlando Raola (Usono): Transformado de "Eternaj Komencantoj" al "Maturaj Ellernintoj" aŭ "Tra densa mallumo briletas la celo"
12.00-12.45: Duncan Charters (Usono): Pli efika lingvoinstruado dum la pandemio: ideoj kaj miaj spertoj ĉe instruado de la hispana virtuale en la propraj klasoj
12.00-12.45: Karina Oliveira (Brazilo/Koreio): Miaj spertoj en la unua ĉeesta NASK dum la pandemia epoko
12.45-13.15: Kristin Tytgat (Belgio): Dulingvaj lernejoj en Bruselo
13.15-13.45: Maritza Gutiérrez (Kubo): Radio kiel didaktika ilo: spertoj pri alfabetigo per kuba lernometodo en Haitio
13.45-14.00: Fermo

# Internacia Kongresa Universitato

**IKU**

La Internacia Kongresa Universitato (IKU) estas unu el la plej popularaj kaj prestiĝaj programeroj de la Universala Kongreso. Unuafoje ĝi okazis en la Universala Kongreso de 1925 en Ĝenevo, kun la nomo Internacia Somera Universitato. En 1981, okaze de la unua sud-hemisfera UK, la nomo estis modifita al Internacia Kongresa Universitato. En Montrealo 2022 realiĝos la **75-a IKU**-sesio. Ĝi konsistas el 7 prelegoj pri diversaj sciencaj temoj, prezentataj de fakuloj en sia kampo, universitatanoj ktp. La prelegoj ne estas tro teknikaj kaj taŭgas por ĝenerala klera publiko. En la IKU-inaŭguro okazanta dimanĉe, ĉiuj preleganoj prezentas unu-minutan reklaman prezenton de sia prelego. Kunordiganto: A. Wandel.

**AIS**

Tri el la IKU-prelegoj havas daŭrigajn prelegojn, en kiuj la preleganto povas plivastigi pri la temo aŭ prezenti rilatajn temojn, ekzerci kaj ekzameni. La daŭrigaj prelegoj okazas kunlabore kun Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) ekde 1995. Ofte ankaŭ okazas fine de la lasta prelego ekzameno kaj la sukcesintoj ricevas AIS-atestojn, publike disdonatajn dum la Scienca Forumo. Kunordiganto: A. Wandel.

**Scienca Kafejo**

La Scienca Kafejo (SK) okazas de 2015 ĉiujare. Temas pri pli popularnivelaj prelegoj ol IKU, kiuj daŭras ĉ. duonhoron, kiuj tamen estas pri same interesaj sciencaj kaj aliaj variaj temoj. Ĉi-jare estas du blokoj de la SK kun po kvar prelegoj. Kunordiganto: A. Wandel.

**La IKU-libro**

Por helpi sekvi kaj memori la prelegojn, aperas la IKU-libro, kiu enhavas la tekstojn kaj tri-lingvajn resumojn de ĉiuj 7 IKU-prelegoj kaj ankaŭ de la 8 prelegoj en la Scienca Kafejo. Ĝi estas aĉetebla en la Libroservo kaj antaŭ la prelegoj kontraŭ speciala kongresa prezo de 15 eŭroj.

**Scienca Forumo**

Tiu estas unuhora kunveno, kiu servas por prezenti kaj pridiskuti diversajn sciencajn organizaĵojn kaj instancojn kiel ekzemple ISAE, STEB, AIS, IKU kaj la scienca agado de TEJO. Kadre de ĝi oni ankaŭ publike disdonas la AIS-atestojn por la partoprenantoj en la IKU-AIS-kursoj kaj ekzamenoj. Pro tio ĝi tradicie okazas vendrede. Kunordiganto: A. Wandel.

**Faka Forumo**

La Faka Forumo estas programero dum la UK, dum kiu reprezentantoj de Fakaj Asocioj povas prezenti la agadon de sia asocio, proponi kunlaboron, fari sugestojn kaj interkomuniki. Ĝi okazis dum pluraj UK-oj antaŭ la pandemio, kaj virtuale dum la unua Virtuala Kongreso kaj inter la du Virtualaj Kongresoj. Por Montrealo estas proponite okazigi ĝin hibride, ĉar pluraj Fakaj Asocioj ne povos sendi reprezentantojn al Montrealo. Kunordiganto: A. Wandel.

# IKU-prelegoj



La Rektoro **Geoffrey Greatrex** estas profesoro pri klasikaj studoj en la universitato de Otavo, kie li nun pasigis preskaŭ dudek jarojn. Kvankam li naskiĝis en Otavo, li edukiĝis en Britio, kie li studis en la universitato de Oksfordo. Li doktoriĝis pri malfrua romia historio: lia tezo traktis la persajn militojn de la imperiestro Justiniano. Movade, li prezidis JEB kaj EAB en Britio antaŭ ol li transloĝiĝis al Kanado; tie li prezidis KEA kaj estas nun ĝia vicprezidanto. Li jam prelegis dufoje en la IKU: en Roterdamo (2008) kaj Rejkjaviko (2013). Li estis rektoro de IKU 2020.

## Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb



**Amri Wandel**

Profesoro pri astrofiziko en la Univ. de Jerusalemo ekde 1990. Doktoriĝis (1983) pri astrofiziko en la univ. de Novjorko. Inter 1983 kaj 1990 li docentis en Usono en la universitatoj de Princeton, Maryland kaj Stanford kaj esploris en la Wiezmann-Instituto (Israelo). Esploras pri astrobiologio, nigraj truoj kaj aktivaj galaksioj. Prezidanto de la Israela societo por Astrobiologio kaj membro de la Internacia Astronomia Unio. UEA-estrarano pri Scienca kaj Faka Agado (kvaran fojon ekde 1995). Prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj, membro de la Akademio de E-o (ekde 1992). Iama prezidanto de TEJO kaj de E-Ligo en Israelo. Libroj: *La Kosmo kaj Ni* kaj *Astrofiziko kaj vivo en la universo* (en la hebrea, 2021).

**Resumo**

Fine de decembro 2021 la tuta mondo sekvis la lanĉon de la spacteleskopo James Webb, sekvanto de la teleskopo Hubble, kiu dum tri jardekoj da observado akiris plej fantastajn fotojn kaj sciencajn rezultojn, pli ol ajna alia teleskopo. James Webb, kiu estas centoble pli potenca ol Hubble, esploros la unuajn stelojn kaj galaksiojn en la prauniverso kaj serĉos vivsignojn en eksterplanedoj de foraj sunsistemoj.

Ni vidos sciencajn atingojn de teleskopoj en la spaco, kun emfazo pri Hubble kaj James Webb, sed ne nur ili. Aldone al Hubble, kiu observas ĉefe en videbla lumo, oni sendis multajn teleskopojn kiuj funkcias per aliaj specoj de radiado, kiel Spitzer en infraruĝo, Chandra en X-radioj, Plank en mikroradiado, Kepler por malkovri eksterplanedojn kaj multaj pli; ĉiu el ili revoluciis nian komprenon de la universo. Dum sia 30-jara funkciado la teleskopo Hubble atingis mirindajn bildojn kaj rezultojn, multe pli ol ajna alia teleskopo, sur la Tero aŭ en la spaco. Kiel aludas la titolo, ni vidos la plej elstarajn bildojn de Hubble: de planedoj kaj satelitoj en nia sunsistemo ĝis pra-galaksioj antaŭe en la juna universo.

La nova spacteleskopo James Webb (JWST), povos realigi senprecedencajn observojn, kiuj ĝis nun estis ekster la atingo de la homaro, kiel apero de la unuaj steloj en la universo kaj serĉo de vivsignoj en eksterplanedoj. Kial ŝtatoj kaj spacoagentejoj investas grandegajn monsumojn por sendi teleskopojn al la spaco? Teleskopoj sur la Tero estas limigitaj de la atmosfero, kiu nebuligas la bildon en videbla lumo, al kiu ĝi estas travidebla. Krome, ekzistas specoj de radiado kiel ultraviola (UV), rentgenaj radioj (X) kaj gamaradioj kiuj estas blokitaj de la atmosfero, do por observi ilin oni devas sendi la koncernajn teleskopojn ekster la atmosferon.

*Dimanĉo, 13:00-14:30, Nourmont; Mardo, 12:00-13:00, Beaucheminf*

## Enkonduko al petrofiziko kaj petrofizika taksado: kiel priskribi rokojn kaj fluidojn profunde en la tero



**Fernando Maia Jr.**

Brazila esperantisto, naskiĝis 1983. Geologo (Univ. Braziljo/UnB, 2005); specialisto pri Analizo de Sedimentaj Basenoj (Univ. Subŝtato Rio-de-Ĵanejro/UERJ, 2007) kaj pri Kompleksa Petrofiziko (Univ. Teksaso ĉe Aŭstino en Usono/UT, 2010). Geologo kaj petrofizikisto ekde 2007 por la nafto-kompanio Petrobras, de 2015 kunordiganto de projektoj pri esploro kaj produktado, de 2020 kunordiganto de teamo pri rok-fluida interago. Petrofizika instruinto (Univ. Petrobras/UP kaj Federacia Univ. de Serĝipo/UFS), revizianto de kapabligaj programoj de Petrobras por geologoj kaj petrofizikistoj. Eks-prezidanto (2016-2018) de la brazila ĉapitro de la Monda Societo de Petrofiziko (SPWLA), respondeculo pri rilatoj kun univ. Petrobras kaj SPWLA. Elektita regiona direktoro de SPWLA por Latin-Ameriko (2019), abdikinta pro vicprezidanteco en UEA (2019-2022). Lastatempe kunlaboranto por energia transiro en Petrobras, pri hidrogeno kaj geoterma energio.

**Resumo:**

*Petrofiziko* (el la greka “petra” = roko + fiziko) estas la studo de la fizikaj kaj kemiaj proprecoj de rokoj kaj ilia fluida enhavo, per rektaj aŭ nerektaj analizoj, kun kvanteca celo, aplikata ĉefe en la esploro de mineralaj kaj energiaj rimedoj en la terkrusto, preci-

pe (sed ne nur) en la identigo kaj taksado de hidrokarbonaj akumuliĝoj ĉe nafto-putoj. *Petrofizika taksado* estas la karakterizado de rokoj kaj fluidoj per iliaj fizikaj proprecoj, ĉu nerekte mezuritaj per puto-sondaĵoj, ĉu rekte mezuritaj el rokaj kaj fluidaj specimenoj, precipe kun la celo identigi la traboritajn rokojn kaj iliajn fluidojn kaj kalkuli la porozecon (porhavecon, porecon) kaj saturadon de rokoj per hidrokarbono aŭ akvo. Per ĉi tiu prezento la interesatoj de la Internacia Kongresa Universitato 2022 povos unue scii pri la bazaj datumoj necesaj por la petrofizika analizado, kiel natura gama-radiado, elektra rezisteco (specifa rezistanco), denseco kaj akustika rapideco, akiritaj per elektra sondado en nafto-putoj. Poste ili povos kompreni la bazan laborfluon de petrofizika taksado por kalkulado de argileco, porozeco kaj fluid-saturado de traboritaj roktavoloj. Aldone estos baza prezento pri akirado kaj interpretado de sismaj datumoj, sedimenta geologio, formado de nafto-sistemoj kaj teknikoj por traborado de nafto-putoj, ĉar tiuj estas scioj necesaj por la petrofizika analizado. Finfine estos prezento pri la apliko de petrofiziko ankaŭ por studo de subteraj akvo-rezervoj kaj geoterma energio cele al daŭripova evoluigo, krom ekzercoj por plenumi analizadon kaj fari kalkulojn por taksi ĉu la traboritaj roktavoloj en sedimentaj basenoj estas efektivaj rezervujoj por ekspluatado de mineralaj kaj energiaj rimedoj utilaj por la socio.

*Dimanĉo, 14:45-15:45, Nourmont; Mardo, 10:45-11:45, Beauchemin*

## Kemiaj faktoroj en provizado de akvo por satigo de homaj bezonoj



**Orlando E. Raola**

Naskiĝis en Havano (1955). Doktoro pri Kemio (UC Santa Barbara, 2005) kaj profesoro pri kemio ĉe Santa Rosa Junior College. Esplorinteresoj rilataj al x-radia absorbada spektroskopio kaj al neŭtrona difraktado kaj ilia aplikado al studo de diversaj materialoj je la nanometra skalo kaj al mediprotektado. Esperantisto ekde 1984. Preleganto por la 75-a UK, preleganto en la Internacia Kongresa Universitato de la 88-a UK (Gotenburgo), en Havano en la 95-a UK kaj en Bonaero en la 99-a. UK, 100-a en Lillo kaj 101-a en Nitro, 102-a UK en Seulo kaj 104-a en Lahti. Ekloĝis en Usono en 1994, kaj tuj ekaktivis en la loka (San Franciska golfo), Kalifornia kaj tutlanda movadoj. Prezidanto de la landa asocio Esperanto-USA (2011-2017). Instruis en Somera Kursaro ĉe Universitato de Kalifornio San Diego (2010). Elektita al la Akademio de Esperanto (2016). Organizanto de la Esperantologia Konferenco kadre de la UK-oj ekde 2015 ĝis 2021. Elektita al la Estraro de UEA en 2019.

**Resumo**

Disponeblo de sufiĉe da pura akvo estas esenca kondiĉo por vivo sur nia planedo, kaj tion agnoskas la Celo № 6 kadre de la Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj. Malgraŭ la fakto ke kiel kemiaĵo akvo estas relative abunda sur la Tero, nur eta parto de la ekzistanta akvo taŭgas por satigi plejparton de la homaj bezonoj. Tiu

ĉi prelego prezentas la kemiajn parametrojn kiuj ebligas aŭ malebligas diversajn uzojn de akvo, la analizajn ilojn nuntempe uzatajn por certigo de tiuj parametroj kaj plurajn sciencajn kaj teknologiajn evoluojn por plibonigo de akvokvalito kaj por recikligo de akvo post homa uzo.

*Lundo, 10:45-11:45, Beauchemin; Ĵaŭdo, 12:00-13:00, Beauchemin*

## El Kanado kontraŭ novliberalismo: La granda transformado de Karl Polanyi kaj La ŝok-doktrino de Naomi Klein



**Alessandra Madella**

Alessandra Madella, italino, studis japanajn lingvon kaj literaturon ĉe la Universitato Ca' Foscari de Venecio (Italio) kaj la Universitato de Tokio (Japanio). Ŝi doktoriĝis pri Komunikaj Studoj (Retoriko) ĉe la Universitato de Iowa (Usono), pere de disertacio pri la franca filmo "Hiroshima mia amo". Ŝi estis profesorino pri Filmhistorio kaj Esperanto ĉe la Artkolegio de Kunming en Ĉinio. Ekde la somero 2022 ŝi instruos ĉe la Zaozhuang-a Universitato, ankaŭ en Ĉinio. Ŝi prelegis pri Karl Polanyi, Naomi Klein, Giovanni Arrighi kaj ekonomika retoriko dum la Itala Kongreso en Asizo, 2021.

**Resumo**

Kaj la hungar-devena ekonomia historiisto Karl Polanyi kaj la kanada ĵurnalistino Naomi Klein havas fortajn ligojn kun Montrealo. Polanyi ekloĝis en Kanado kiam li estis instruanta ĉe Universitato Columbia en Novjorko, kaj la Instituto Karl Polanyi pri Politika Economiko troviĝas nuntempe ĉe Universitato Concordia en Montrealo. Klein naskiĝis en Montrealo. Ambaŭ pensuloj kritikas la ideon de mem-reguliga merkatekonomio kaj novliberalismon. En mia kontribuo mi precipe priparolas iliajn librojn *La granda transformado: la politikaj kaj ekonomiaj originoj de nia tempo* (1944) kaj *La ŝok-doktrino: la kresko de disastra kapitalismo*, montrante paralelojn kaj kontrastojn inter iliaj verkoj.

*Ĵaŭdo, 10:30-11:30, Nourmont*

## La Sciencoj sur la Silkaj Vojoj



**Bill M. Mak**

Denaske el Honkongo, la kanadano D-ro Mak diplomiĝis pri lingvistiko ĉe la McGill-Universitato en Montrealo en 1996. Li doktoriĝis pri Budhisma filologio ĉe la Pekina Universitato kaj poste daŭrigis sian esploristan karieron en Germanio, Usono kaj laste Japanio, kie li estis vic-profesoro pri la historio de scienco en la Kiota Universitato. Inter liaj fakaj interesoj estas: sanskrita

literaturo, historiaj religiaj kaj sciencaj kontaktoj inter Ĉinio kaj Barato, kaj la historio de scienco. Li nun faras esploron ĉe la Needham-Esplora Instituto en Kembriĝo, Britio, kaj okupiĝas pri sia eldonota libro pri la historio de fremda astronomio en Ĉinio.


**Resumo**

La Silkaj Vojoj, landaj kaj maraj, estas la ĉefa ligo inter la orienta kaj okcidenta mondoj dum jarmiloj. Malgraŭ ilia nomo, ne nur valoraj varoj kiel silko, spicoj, teo, vitraĵo kaj porcelano moviĝis sur la antikvaj vojoj. Ankaŭ sciencaj ideoj (matematiko kaj astronomio el Barato kaj Grekio) kaj inventaĵoj (papero, kompaso, pulvo kaj presado el Ĉinio) disvastiĝis tra la ampleksa transporta reto. En tiu ĉi prelego, oni fokusiĝas je la sciencaj ideoj kaj inventaĵoj de diversaj kulturoj kaj ilia sorto en diversaj partoj de Eŭrazio ekde la komenco de la unua jarmilo p.K. ĝis la mezo de la sekvanta jarmilo.


*Vendredo, 12:30-13:30, Lapenna*

## Vitro, mirinda materialo en la Internacia Jaro de Vitro 2022 de UN




**Suzuki Keiichiro**


Naskiĝis en Jokohamo, Japanio (1948). Laboris longe en la Esplorcentro de Asahi Glass (nun, AGC), kemia kompanio. Ekde 2005 laboras en New Glass Forum en Tokio por scienca datumbazo pri vitro. Doktoriĝis pri teknologio per studo pri ceramikaj materialoj. Lekciis pri neorganikaj materialoj ĉe Yokohama Nacia Universitato 2008-2014. Prezidanto de Jokohama Esperanto-Rondo (nun, Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama) 1998-2007, LKK-ano por la Jokohama UK en 2007, kaj Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto 2012-2020.


**Resumo**

Vitron ĉiuj vidas ĉie ĉiam kiel materialon por fenestro de domo kaj aŭto, substrato aŭ kovrilplato de televidilo, komputilo, poŝtelefono kaj brakhorloĝo, kaj glaso, botelo, artaĵo ktp. Vitro havas tre utilajn karakterojn kiel travidebleco, malmoleco, hermetikeco kaj kemia stabileco. Vitro ege kontribuis por la disvolvado de la homaro. Ekzemple la invento de teleskopo kun vitra lenso disvolvis astronomion, kaj same mikroskopo progresigis biologion. En la 20-a jarcento optika fibro de vitro fariĝis la bazo por la hodiaŭa mondo interreta. UN deklaris la Internacian Jaron de Vitro 2022 por diskonigi kaj akceli kontribuadon de vitro al la mondo.

En la prelego estos klarigate kio estas vitro science kaj kial montriĝas la unikaj karakteroj de vitro. Vitro estas amorfa substanco, kiu solidiĝis de likvo sen formado de kristalo. La plej tipa kaj baza vitro de neorganika substanco estas vitro de $SiO_2$ (silicia dioksido). Ĝia atomstrukturo konsistas el 3-dimensie konektitaj $SiO_4$ -kvaredroj sen periodeco je longa distanco. Travidebleco, la plej grava karaktero de vitro, troviĝas pro tio, ke la substanco mem ne sorbas videblan lumon kaj vitro ne havas limojn de grajnoj.

Ekzemploj de epokfaraj teknikoj kaj uzoj de vitro estos montrataj. En malnova tempo vitroplato ne havis altajn platecon kaj fortecon. Kiu tekniko ŝanĝis la kvaliton draste? Tio estas la Flosigo-procedo de stan-banujo. Fandaĵo de vitro flosas sur fandaĵo de stano, kaj la flosigita tavolo fariĝas vitroplato per malvarmigo. Por optika fibro estis inventita $SiO_2$ - vitrofibro kun tre alta pureco, kiu estas produktata per kemia vapordeponado. En la vitrofibro atenuiĝo de lumo estas tre malgranda. Tial ĝi estas uzata per du-tavola strukturo de vitrofibroj kun diferencaj refraktaj indicoj. Reto de optika fibro estis instalita en la tuta mondo. Krome kelkaj aliaj rimarkindaj teknikoj pri vitro estos menciataj, kaj estonta nova ebleco de vitro estos tuŝata.

*Vendredo, 13:45-14:45, Lapenna*

## Medicina Turismo



**Keyhan Sayadpour Zanjani**

Asociita Profesoro pri Pediatria Kardiologio, Infana Medicina Centro, D-ro Gharib Strato, Keshavarz Bulvardo, Teherano, Irano. Iranano (naskiĝis en Mashhad, Irano, la 27-an de aŭgusto 1967).

*Interes-kampoj:* Pediatriaj koraj intervenoj, Marfan-sindromo kaj aliaj aortopatioj, Pompe-malsano

*Eduko:* Medicino en Universitato de Medicinaj Sciencoj de Mashhad; Pediatrio en Universitato de Medicinaj Sciencoj de Mashhad; Pediatria Kardiologio en Shaheed Rajayee Kor-angia Centro, Irana Universitato de Medicinaj Sciencoj; Pediatria kor-interveno en Berlino, Germanio

*Honoroj kaj distingoj:*

- Ekzameno pri universitata akcepto: 1985, 1-a rango en la lando (subgrupo pri medicino)
- Premio Chairmen (Plej bona pediatria kardiologio-esploristo de Azio 2010), dum la 3-a Kongreso de Azi-Pacifika Pediatria Kardiologio
- Kandidato por IPC-Premio dum la 8-a Internacia Laborejo pri Intervena Pediatria Kardiologio

*Esperanto:*

- Esperantisto ekde 1985
- Movado: Prezidanto de Irana E-Asocio (IrEA, nun kaj tri pasintaj periodoj), eksvicprezidanto de Universala Medicina E-Asocio, delegito de UEA, kunordiganto de Mezorienta kaj Nordafrika Komisiono de UEA, komitatano A de IrEA
- Literaturo: Premiita kiel Nova Talento kadre de Belartaj Konkursoj de UEA, prozaj kaj poeziaj verkoj
- IKU: Preleginto virtuale dum IKU 2020 kaj 2021

**Resumo**

Medicina turismo signifas vojaĝi eksterlanden por ricevi medicinajn servojn. La celo povas esti ricevo de servo ne ekzistanta en la loĝlando, servo malpli kosta en la turis-

molando aŭ servo kiu ne bezonas longan vicon en la turismlando. Ofte estas kelkaj celoj, inkluzive de aliaj turismaj celoj (vizito de alia lando, vizito de parencoj aŭ amikoj, pilgrimado ktp). Kosmetikaj operacioj, dentkuracado kaj kuraco de malfekundeco estas oftaj serĉataj servoj. Psikiatriaj kaj medikamentaj kuracadoj malofte estas serĉataj. La celo de medicina turismo povas esti prevento. La aktuala ekzemplo estas serĉo de vakcino kontraŭ Kovimo en alia lando, kiam ne ekzistas vakcinado en la loĝlando aŭ ne ekzistas bonkvalitaj vakcinoj.

La danĝeroj de medicina turismo estas infektoj, aliaj komplikaĵoj de la kuraco, morto de la paciento, kaj financaj, leĝaj aŭ kulturaj problemoj. Grava obstaklo estas lingvaj problemoj. En certaj okazoj, la kuracisto kaj paciento estas samlingvaj, aŭ povas bone paroli saman lingvon. Tamen en multaj okazoj ili bezonas tradukiston. Tio pliigas la koston kaj faras novajn problemojn.

*Vendredo, 16:30-17:30, Nourmont*

# Scienca Kafejo

Ĉi-jare la Scienca Kafejo havas 2 partojn, po 2 horoj. Unua prelegserio okazos marde, la sekva ĵaŭde. Jen la titoloj de unuopaj prelegoj kaj nomoj de prelegantoj:

**Dulingveco kaj multlingveco en Bruselo**
(Kristin Tytgat)
**Birda migrado en la Amerikoj**
(Normand Fleury)
**Plurlingveco kaj multlingveco: du distingindaj konceptoj gravaj por lingva diverseco**
(Gabriel Labrie)
**Loko de novaj fabeloj en la mondo de plenkreskuloj**
(Anna Striganova)

*Mardo, 9:00 -11:00, Solis*

**Lumo, de la Suno al la lasero**
(D-ro Ĵoel Fontaine )
**La Valoroj de Esperanto en ŝanĝiĝanta mondo**
(John Huang)
**La teoremo de Pitagoro**
(François Lo Jacomo)
**Ĉu vi konas geologion?**
(Fernando Maia Jr.)

*Ĵaŭdo, 13:00 -15:00, Nourmont*

# Junulara Programo

Respondeculino de la Junulara Programo estas Camille-Amélie Koziej Lévesque Camille-k-levesque@hotmail.com. Pliajn detalojn vidu en la Kongresa Kuriero kaj en la aparta Telegram-apo. Por havi ĉiujn aktualajn informojn, aliĝu al la speciala Telegrama grupo por la Junula Programo de la UK: https://t.me/UKMTL.

Ĉiuj gejunuloj venu interkonatiĝi dimanĉe, je 13:00 al la korto Harmon.

**Komuna manĝado - bageloj**

Gustumado de bageloj kaj babilado ĉe La Fabrique de Bagel (20 minutoj piede; prezo 10$/bagelo). Loko: 3563 Boul. Saint-Laurent, Montréal, QC H2X 2T6.

*Sabato 1, 13:00 (daŭro: 2 horoj)*

**Ekskurso sur Mont Royal**

Ekskurso sur Mont Royal por la belvidejo kun panoramo sur la urbo Montrealo (metroo kaj piediro tra McGill-kampuso). Loko: Mont Royal.

*Dimanĉo, 13:30 (daŭro: 2,5 horoj)*

**Komuna bierumado en trinkejo**

Vespero ĉe Pub Le Sainte-Élisabeth, manĝado kaj trinkado (2 minutoj piede). Loko: 1412 Rue Sainte-Elisabeth, Montréal, QC H2X 1L4.

*Lundo, 17:00 (daŭro: 3 horoj)*

**Insectarium de Montréal**

Vizito de la muzeo Insectarium de Montréal por malkovri diversajn insektojn kaj pripensi nian rilaton al ili (metroo kaj piediro). Loko: 4581 Rue Sherbrooke E, Montréal, QC H1X 2B2.

*Mardo, 13:00 (daŭro: 4 horoj)*

**Amuza tago en La Ronde**

Tago en la amuzparko La Ronde (metroo, buso kaj piediro). Loko: 22 Chem. Macdonald, Montréal, QC H3C 6A3.

*Merkredo, 10:30 (daŭro: 7 horoj)*

**Vizito de la Geja kvartalo kaj Drag king-spektaklo**

Ĉe Cabaret Mado (10 min. piede). Loko: 1115 Rue Sainte-Catherine E.

*Ĵaŭdo, 19:00 (daŭro: 4,5 horoj)*

**Ludoj en parko Lafontaine kaj komuna manĝado - poutine**

Ludoj en parko Lafontaine kaj gustumado de poutine ĉe La Banquise (20 minutoj piede). Loko: Parc La Fontaine, 3819 Av. Calixa-Lavallée, Montréal, QC H2L 3A7 + 994 Rue Rachel E, Montréal, QC H2J 2J3.

*Vendredo, 10:00 (daŭro: 3 horoj)*

**Granda adiaŭa biero en trinkejo**

Por tiuj, kiuj restas post la fermo - ĉe Pub Le Sainte-Élisabeth (2 minutoj piede). Loko: 1412 Rue Sainte-Elisabeth, Montréal, QC H2X 1L4.

*Sabato 2, 17:00 (daŭro: 3 horoj)*

# Artaj aranĝoj

## Multnacia Nacia Vespero

La kanada Nacia Vespero dum la UK devus nomiĝi Multnacia Vespero, ĉar en Kanado loĝas pli ol 50 indiĝenaj nacioj krom tiuj venintaj de Eŭropo. En Montrealo nuntempe kunvivas pli ol 120 naciecoj.

Ni do povos prezenti al vi nur fragmenton de tiu bunta kultura riĉeco. La vespero komenciĝos per la Bufalo-Ĉapelo-Kantistoj (Buffalo Hat Singers), kiu estas fama grupo bazita en la montreala regiono. Respekte al siaj tradicioj, ili estas kunigitaj de la Spirito de kanto kaj la Potenco de la tamburo — por paco, amikeco kaj frateco.



Poste, el Kangiqsualujjuaq en Nunaviko, Kebekio, en la Nordo de Kanado, Lydia Etok, duope kun alia kantistino, prezentos virinan inuitan gorĝan kantadon. Vere unika tradicia maniero kanti.

La tria parto prezentos al vi franckanadan folkloran muzikon kaj dancadon fare de la grupo *La R'voyure* (tradukebla per 'la revid'). Naŭ dancistoj mirigos vin per siaj viglaj kaj energiaj dancoj.



Kvare, Jones the Pipes ludos tradician irlandan kaj skotan muzikon per sakŝalmo akompanata de violonisto.

Fine, Oktoecho estas ensemblo specialiĝanta pri miksado de muziko de Proksima Oriento kaj la Okcidento kune kun muziko el la amerikaj indiĝenaj nacioj.

Havu agrablan Multnacian Vesperon!

Ni danke agnoskas la financan subtenon de Kanada Esperanto-Asocio por okazigi la Nacian Vesperon.

*Dimanĉo 19:00 Teatro Impérial - Zamenhof*

## Internacia Esperanto-Ĥoro

Zdravka Boytcheva gvidas la IEĤ kaj varme invitas la kantemulojn (korusanojn - novajn kaj malnovajn) partopreni en la provludoj dum la semajno. La koruso aktivas jam pli ol 50 jarojn. Venu esti parto de tiu ĉi unika historiaĵo!

*Dimanĉo 17:15 -18:00, Beauchemin; lundo 16:45 -18:00, Nanovfszky; mardo 15:45 -16:30, Beauchemin; ĵaŭdo 16:30 -18:00 kaj vendredo 16:00 -17:30, Nanovfszky.*

**Joëlle Rabu kaj Nico Rhodes**

Konata kanada kantistino de la stilo de la fama franca kantistino Edith Piaf, Joëlle Rabu, venas al la scenejo kun sia filo, la premiita pianisto kaj komponisto Niko Rhodes.

Por ĉi tiu vespero la duopo elektis kantojn el pluraj muzikaj fontoj: kanadaj komponistoj, Beatles, Piaf, amkantojn de "latina" Ameriko, melodiojn el muzikaj filmoj. La koncerton ili finos per "Esperanto", la kanto kiun Joëlle Rabu (teksto) kaj Douglas Dodd (muziko) komponis en 1986. Ĝia dek-lingva teksto simbolas etnan diversecon. Joëlle kaj tri muzikistoj, Douglas Dodd, Charlie Knowles kaj Tom Neville, prezentis la kanton "Esperanto" dum la UK en Varsovio (100-jara jubileo de Esperanto, 1987).

Ĝi estis registrita la sekvantan jaron, aperis kun la Vankuvera Infana Koruso kaj la Kanada Okcidenta Orkestro, kaj estas havebla per 'VINILKOSMO'-diskoj.

Joëlle kaj Niko sincere dankas al UEA kaj al LKK por la invito partopreni kaj koncerti dum la 1-a postpandemia UK, en Montrealo.

**Biografioj:**

Joëlle estas konata pro sia kapablo adaptiĝi al multaj muzikstiloj, de klasika ĝis kabaredo aŭ ĵazo. Ŝia riĉa voĉo kaj alloga agado fascinis spektantarojn dum multaj jaroj. Ŝi koncertis en la tuta Kanado, Usono kaj en partoj de Eŭropo kaj gajnis laŭdon kaj admiron tie.

Niko estas talenta komponisto kaj virtuoza pianisto. Li intime komprenas kaj akompanas ĉiujn voĉajn nuancojn de sia patrino. Li kreskis vojaĝante kun siaj artistaj gepatroj. Jam 16-jaraĝa li gajnis premiojn en konkursoj pianaj kaj saksofonaj (jes, Niko regas ankaŭ tiun instrumenton). Antaŭ ol li atingis sian 25-an jaron, li direktis dekojn da kanadaj artaj spektakloj.

La reciproka ligo de ĉi tiu duopo estas kvazaŭ elektra. Iliaj generaciaj vidpunktoj, iliaj vivsortoj, iliaj kordoloroj aŭ ĝojoj, ilia vundebleco kunigas ilin en la kantoj.

Post la morto de sia edzo Joëlle trovis novan hejmon sur Haida Gwaii, en la norda parto de la kanada okcidenta marbordo. Tie ŝi plene dediĉis sin al la laboro por la indíĝena turisma industrio - kaj tute paŭzis en la koncertado. Sed post sep jaroj kaj dank' al Niko kaj lia kaĵolado ŝi revenis hejmen, en Nanaimo, sur la insulo Vankuvero.

La pandemio estis taŭga oportuno por reveni al Esperanto. La juna menso de Niko rapide ensorbadis la lingvon, kaj la menson de Joëlle inundadis rememoroj pri la tempo antaŭ 35 jaroj, kiam ŝi koncertis dum la 71-a UK en Pekino, Ĉinio.

*Mardo 19:30 -20:30, Zamenhof*




## "1910": teatraĵo

**Aktoroj:** Garry Evans, Alena Adler
**Reĝisoro:** Alena Adler
**Piano:** Stefano (Étienne Laflamme)
**Verkinto:** Ĵenja Amis

Ĉu vi sciis, ke en la jaro 1910 Zamenhof vizitis Amerikon, por la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto en Vaŝingtono, kaj poste vojaĝis al Montrealo por renkonti siajn familianojn? Per speciala tempomaŝino ni teleportis al vi la specialan gaston, rekte el 1910, kiu rakontos al vi ĉion, kion vi volas scii, pri la grandioza Internacia Kongreso en Vaŝingtono en 1910 kaj la vojaĝo al Kanado poste! Ĝi estas multmedia interaga teatraĵo kun pluraj muzikaj elementoj. Inter la muzikaĵoj atendas vin la premiero de forgesita kaj re-malkovrita eldono de la unua kanto en Esperanto iam ajn eldonita en Ameriko en 1907: "Mi Aŭdas Vin" laŭ la poemo de D-ro Leono Zamenhof (1875 - 1934) — la frato de L.L. Zamenhof. Estos aliaj muzik-pecoj de la tempo de Zamenhof. La komponisto de "Mi Aŭdas Vin" estas s-ro Herbert Harris, Usono — li estis orgenisto en Portlando (Oregono) kaj Bostono (Masaĉuseco) (1846 - 1919). La reĝisoro kaj aktorino de la teatraĵo estas Alena Adler (ŝi rolis kiel Helena Bonvolo en la fama serio "Pasporto al la Tuta Mondo"). La ĉef-aktoro estas Garry Evans, la kasisto de la LKK por la Montreala UK, kaj la verkinto — Ĵenja Amis, la sekretario por la Montreala UK. Legu pli pri la teatraĵo en la oktobra numero de la revuo *Esperanto* (2022). Étienne (Stefano) Laflamme estas plurstila instrumentisto (orgeno, piano, gitaro) kaj instruisto de piano en la Muziklernejo Arquemuse (Kebeko).

*Ĵaŭdo 19:30 -20:30, Zamenhof*

## Kongresa Balo



Klez-Kanada

Yene Velt

**Muzikstilo:** Tradicia klezmero

**Priskribo:** Vigla tradicia klezmera (juda) muziko kun du violonoj kaj zimbalono

**Biografio:** KlezKanada estas elstara organizaĵo en la moderna jida kulturo kaj juda muziko.

Ekde 1996, ĝi instruas, nutras kaj grandigas ĉi tiun kulturon kaj prezentas tradician judan arton al vasta publiko. Ĝia celo estas kreskigi judan kulturan kaj artan kreivon tutmonde kaj kiel etnan heredaĵon kaj kiel konstante evoluantan nuntempan kulturon kaj identecon por ĉiuj. De ĝia komenco kiel malgranda somera festivalo, KlezKanada fariĝis unu el la gvidaj judaj kulturaj organizoj en la mondo. Eksciu plu: klezkanada.org.

*Lundo 21:00 -24:00, Hyatt*

## Banĝo-Esperanto

**Armel Amiot** (Foto de Guillaume Villegrain)

**Priskribo:** La banĝo estas la posteulo de afrikaj instrumentoj kunportitaj en la memoro de la sklavoj sur la plantejoj de la Usona Sudo; ĝi iĝis metala en la impeto de la In-



dustria Revolucio, disvastiĝis kaj multiĝis en la plej diversajn muzikstilojn, de Frua Ĵazo de Nov-Orleano al tradicia irlanda muziko tra brazila Ĥoro, kaj kelkaj revenoj al Afriko. Oni povas imagi ĝin brua kaj agresema, kiel povas sugesti ĝia uzado foje en stratmuziko kaj korn-orkestroj; sed je pli detala rigardo, ĝi prezentas tutan horizonton da sonoroj de granda delikateco, de kristala ĝis kolera, tra milda kaj ironia.

Ankaŭ Esperanto kaŝas sian ludon. Sub ĉi tiu struktura simpleco, pro sia strikta reguleco, kaŝiĝas mondo da riĉaj kaj esprimplenaj sonoj. Ĝia aglutina konstruo donas al ĝi aliron al multoblaj nuancoj, kiuj povas esprimi la plej diversajn sentojn.... Kiel la banĝo, ĝi prenas sian fonton tie kaj ĉi tie sur la planedo, kaj same kiel la iomete abrupta sono de la banĝo, ĝi devas ekuzi ĝin kaj praktiki ĝin por vidi dolĉan kaj kantantan esprimadon ŝpruci, tiel elvokivan kaj komunikeman.

Banĝo Esperanto estas la nova projekto de banĝisto-kantisto Armel Amiot.

"Estis por mi aŭdaca projekto lerni tute novan lingvon dum la trudizoliĝo, dum oni malkovras tutan universon da ebloj, tuj verkante kantojn.... La ideo estis atingi tre naivan poezion, iom kiel tiu de infano lernanta paroli. De kanto al kanto (ili estas prezentataj preskaŭ laŭ la ordo de la verkado), la lingvaĵo disvolviĝas. Iom post iom aperis ses kantoj por elvoki vivon, amon, kaj la forton de memoro per noviga kaj refreŝiga sono. La aventuro apenaŭ komenciĝis, mi estas komencanto en Esperanto! Sceneje, mi do dumtempe prezentos ĉi tiujn kantojn kune kun aliaj en malsamaj lingvoj (franca, angla, antila kreolo); kaj poste la Esperanta parto evoluos ĝis ĝi formos tute apartan repertuaron."

*Ĵaŭdo 17:00 -18:00, Zamenhof*



## Nova Sento

**Stefano kaj Kristina Miroshkina**
**Muzikstilo:** Klasika
**Priskribo:** La kebekia pianisto Stefano kaj la rusa soprana kantistino Kristina Miroshkina renkontiĝis kiam ili samtempe studis ĉe la Muzika Akademio Gnessin', en Moskvo.

Ĉi-somere, ili ludas por vi barokan muzikon de Händel, post-romantikan rusan muzikon kaj ĵazecan muzikon de la 20-a jarcento.

La programo inkluzivas pecojn tradukitajn en Esperanto, kaj ankaŭ originalan Esperantan musikon komponitan en la 2021-a jaro de la usona David Gaines.

*Mardo 17:00 -18:00, Zamenhof*

## Stelmani’

**Gijom’ Armide kaj gastaj artistoj**
**Muzikstilo:** Franclingva popmuziko

**Priskribo:** La franca kantisto Gijom' Armide adaptis al Esperanto kelkajn el la plej gravaj kanzonoj de la rok-opero *Starmania*. Tiun spektaklon kunverkis kebekiano Luc Plamondon (tekstoj) kaj franco Michel Berger (muziko). Ĝi estas unu el la plej grandaj sukcesoj de la franclingvaj pop-muzikaj spektakloj. Ankoraŭ nuntempe ĝiaj kanzonoj estas tre ŝatataj de la franclingva publiko kaj kantataj en la franca kaj angla tra la mondo. Gijom' kantos pianlude pli-malpli 15 kanzonojn de la spektaklo kaj rakontos al ni pri la roluloj kaj la okazaĵoj de la opero. Kelkaj surprizoj artaj kaj homaj atendas vin!

*Ĵaŭdo 20:30 -21:30, Zamenhof*



## Nokta Ŝoforo

**Yves Desrosiers**

**Priskribo:** Preskaŭ 8 jarojn post la eldono de sia albumo “Bordel de tête” (kapa kaĉo), Yves Desrosiers revenas kun ĉi tiu albumo kaj instrumenta spektaklo, *Nokta ŝoforo*. Por ĉi tiu albumo, Yves Desrosiers elektis Esperanto-nomojn por la muzikaĵoj, decidis eklerni la internacian lingvon kaj eĉ kantas unu kanzonon en Esperanto.

Kun siaj multaj gitaroj, Yves Desrosiers estos surscene akompanata de talentaj muzikistoj, kiuj ludos vibrafoneton, glitgitaron, kuprajn instrumentojn (trumpeton, aerkontrabason...), drumon kaj klavaron. Ĉi tiu spektaklo estas esploro en melodia kaj etosa muzikuniverso kie spektantoj estos transportitaj en imagan vojaĝon de nokta ŝoforo traveturanta teritoriojn kaj landlimojn en nokta kaj kontemplema soleco.

*Mardo 20:30 -21:30, Zamenhof*

## Bïa kaj Maracujá

La envultema Bïa ĉirkaŭiĝas per la brazila grupo Maracujá por dancigi publikon per tropikaj sonoj.

La pasio kaj la vervo de la kantistino nature kuniĝas al tiu fantasta kvaropo por spektaklo en kiu brazila muziketoso donas sian plejbonon. Danciga, melodia kaj malrezistebla! Post tri jaroj da turneo kun Cirko de l' Suno, Maracujá enradikiĝas en Montrealo per festema kaj danciga repertuaro. Portata de la potenca voĉo de Elie Haroun kaj la transdonema ĝojo de siaj muzikistoj, la bando Maracujá spertigas la plejbonon de la brazila muziko kun tute persona sigelo.

*Vendredo 19:30 -20:45, Zamenhof*

## Kongresa Kinejo

Ĉi-jare la kinoarto estos bunte reprezentita dum la kongreso. La temo de la filmoj plene respegulas la ĉi-jaran ĉeftemon pri la indiĝenaj lingvoj kaj popoloj.

**Indiĝenaj filmoj en Esperanto: Wapikoni Mobile**

Ĉiujare ĉ. 300 indiĝenaj gejunuloj partoprenas en atelieroj kaj kreas plurajn dekojn da mallongaj filmoj kaj muzikaj verkoj, kadre de la Wapikoni Mobile - neprofitcela organizo, bazita en Montrealo. Wapikoni Mobile vizitis ĉirkaŭ 30 naciojn en Kanado kaj ankaŭ ekster Kanado kaj produktis pli ol 1000 mallongajn filmojn kaj pli ol 600 muzikaĵojn, donante parolon al pli ol 4 mil indiĝenaj gejunuloj. LKK partneriĝis kun Wapikoni Mobile por montri al kongresanoj kolekton de 16 filmetoj el 7 diversaj nacioj. Tradukis: Stéphane Brault. Helpis subtitoligi: Rogener Pavinski.

*Mardo 16:45 -18:00, Solis*

**Indiĝenaj filmoj en Esperanto: filmoj de la Nacia Film-Oficejo**

Kelkaj elstaraj filmetoj de indiĝenaj filmfaristoj, produktitaj de la Nacia Film-Oficejo de Kanado: Spiroj, Revivigi la Nakotan Lingvon, Tri Mil.

*Mardo 13:30 -14:00, Beauchemin*

**Senveprigistoj* (Les Fros)**



En Abitibio (Kebekio), centojn da kilometroj for de la urbo, iras norden miloj da laboristoj, kiel Jos Montferrand aŭ François Paradis. Ĉi tiuj 21-a-jarcentaj lignohakistoj lernas pri la norda arbaro de Kebekio laborante per veprotranĉiloj. For de siaj familioj, ili vivas kvin ĝis ses monatojn jare en arbaroj de Abitibio. Kebekianoj de franc-kanada origino kunfrotiĝas kun novkebekianoj el Afriko, Orienta Eŭropo aŭ Azio, kiuj ĉiuj venis por perlabori en la arbaro. Ĝuste en ĉi tiu mikrosocio de la Nordo, la filmisto Stéphanie Lanthier invitas nin eniri por tuta sezono.

* vepr/o: Tufo de arbustoj sovaĝaj kaj plejofte dornaj.

*Vendredo 16:15 -17:30, Solis*

**Sinjoroj kaj Sinjorinoj… S-ro Leonard Cohen**

Leonard Cohen estis unu el la plej konataj kanadanoj naskitaj (kaj entombigitaj) en Montrealo. Poeto, komponisto, verkisto. Lia kanto *Haleluja* fariĝis unu el la plej



popularaj kaj rekonataj en la mondo. Ĝi estas ankaŭ tradukita en Esperanton kaj estis invita kanto al la Montreala UK. Tiu neformala nigrablanka filmo montras lin en la aĝo de 30 jaroj dum vizito al sia hejmurbo Montrealo. Li legas sian poezion al entuziasma homamaso, promenas sur la stratoj de la urbo, malstreĉiĝas en ĉi tiu hotelĉambro de tri dolaroj por nokto kaj eĉ baniĝas.

*Ĵaŭdo 14:00 -14:45, Solis*

**Filmoj de Mateo Rankin**



Mateo (Matthew) Rankin estas kebekia eksperimenta filmfaristo kaj esperantisto — honora komitatano por la 107-a Universala Kongreso. Liaj filmoj ricevis tutkanadan kaj ankaŭ tutmondan agnoskon kaj estis plurfoje nomumitaj kiel plej bona filmo en diversaj kategorioj (de Canadian Screen Awards, Jutra, Toronto International Film Festival, ktp.). Li naskiĝis en la provinco Manitobo kaj nun loĝas en Montrealo. Filmoj: Bovovoko, Mortoplonĝo de Mynarski, Tesla: la monda lumo.

*Vendredo 09:00 -09:30, Solis*

# Efemera Artgalerio kaj Bobelarto

Komunumo de literaturamantoj, Bobelarto okazigas plurajn eventojn dum la Universala Kongreso.

Verksesioj estas atelieroj ebligantaj gvidate verki en bonhumora grupa etoso.

Legosalonoj temas pri kunlegado de verkoj. Bobelarto okazigas du tiajn legosalonojn. La unua pri la lastaj eldonaĵoj de la Esperanto-Societo Kebekia. La dua estas premio-ceremonio: anonco kaj komuna legado de la gajnintaj noveloj de la Interkultura Novelo-Konkurso.

La Efemera Artgalerio prezentas artaĵojn de lokaj artistoj, kiujn vi povas ĝui kaj akiri, se plaĉas al vi. Tiu vendado de artaĵoj celas subteni la daŭrigon de la literaturaj agadoj de Bobelarto.

LA DUA ELDONO DE LA INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO REVENAS KUN LA TEMO

# Nokta vojaĝo

Du kategorioj, po kvar premioj.
La limdato partopreni estas la 30-a de septembro 2022.

**VI TROVOS LA NOVAĴOJN ĈE: WWW.AKADEMIO-LITERATURA.ORG/INK**



© Bruno Rouyère 2022

Akademio Literatura de Esperanto

BOBEL ARTO

# EFEMERA ARTGALERIO




Bobelarto fieras inviti vin al sia unua Efemera Artgalerio dum la UK. Trovu tie artaĵojn de lokaj artistoj kaj per aĉetado subtenu la literaturajn agadojn de Bobelarto!

BOBEL ARTO

# Sinceran dankon!

Multaj kongresanoj montris sian solidarecon kun esperantistoj el nepagipovaj landoj, donacante al la bonfaraj kasoj. Tiel la rimedoj de la UK estis pligrandigitaj je miloj da eŭroj, per kiuj estas helpitaj aliĝoj, subvenciitaj restadoj de kongresanoj. Al ĉiuj donacintoj grandan dankon! Ĉi tie ni listigas la nomojn de tiuj kies donacoj atingis nin antaŭ la fino de junio.

**Triamonda fondaĵo**
A. Montesinos
K.P. Hoff
J. Pietilainen
R. Moerbeek
T. Bormann
B. Crisp
B. Speakmon
M. Juy
T. Kleemann
M. L. Martinez
M. D. Barcellos
B. Moon
A. S. de Vries
G. Harmide
F. Lo Jacomo
N.S.Y. Kessler
B. Crisp
C. de Fuentes
R. J. Williamson
N. Fleury
A. Blair
M. Kennedy
T. Kleemann
M. Fettes
B. Moon
S. Herd
A. Weber
K. Leith
J. Pietilainen
H. Martha
M. Zaleski

**Blindula kaso**
B. Speakmon
D. Kampmann
M. D. Barcellos
N. Tomida
J. Bishop
F. Maia Jr.
Kikusima K.
T. Kleemann
B. Moon
A. Weber
L. Hall

**Fondaĵo Canuto**
A. Montesinos
K.P. Hoff
J. Pietilainen
Y. Miklaf
E. Quietensky
R. Moerbeek
T. Spanjaard
B. Speakmon
M. Arnaud
M. Juy
S. Mynttinen
T. Kleemann
M. L. Martinez
R. Blanco Arbe
B. Harmon
M. D. Barcellos
B. Moon
F. Lo Jacomo
N.S.Y. Kessler
C. de Fuentes
A. Blair
J.S. Meyer
T. Kleemann
B. Moon
B. Regis
A. Weber
K. Leith
L. Hall
G.N. Parvaz

**Ĝenerala kaso**
M. Hugh McClelland
K.P. Hoff
N. Fleury
Y. Miklaf
R. Moerbeek
B. Speakmon
L.B. Ross
J. Kalilich
S. Brodd
D. Wilke
E. Wilke
Kang H.g.
M. Juy
S. Mor
T. Kleemann
M. L. Martinez
S. Herda
M. D. Barcellos
M. T. Hopkins
M. Bloudek
S. Herda
G. Tabard
B. Westerhoff
R. Mattos
C. de Fuentes
T. Bormann
R. J. Williamson
J.S. Meyer
D. Becker
T. Kleemann
I. van de Stadt
Satoo Morio
Tanaka Yosino
A. Weber
Ikote Khonde F.
L. Hall
G. Tabard
G.N. Parvaz
R. Moerbeek
M. Turkova

**Adoptaj Gepatroj**
D. Janot
K.P. Hoff
F. Cruzaley
M. Fritz
R. Moerbeek
B. Speakmon
G. Wallez
N. Wallez
M. Juy
M. Juy
F. Nitzsche
T. Kleemann
M. L. Martinez
M. D. Barcellos
B. Moon
N. Tomida
F. Lo Jacomo
N.S.Y. Kessler
F. Chabriac
C. de Fuentes
T. Bormann
D. Janot
F. Lorrain
A. Blair
J.S. Meyer
T. Kleemann
B. Moon
B. Regis
A. Weber
L. Hall

**Infana Kaso**
T. Kleemann
M. L. Martinez
T. Tukamoto
D. Karthaus
B. Harmon
M. D. Barcellos
M. Frolik
B. Moon
U. Brandenburg
N. Tomida
C. Barshinger
C. de Fuentes
S. Blair
M. Blair
D. Janot
F. Lorrain
A. Blair
J.S. Meyer
T. Kleemann
B. Moon
B. Regis
L. Hall
G. Tabard
U. Brandenburg

**Artaj aranĝoj**
J. Pietilainen
T. Kleemann
M. L. Martinez
D. Kampmann
M. Molnar
M. D. Barcellos
C. Nourmont
G. Harmide
C. de Fuentes
J.S. Meyer
T. Kleemann
B. Regis
K. Leith
Park Y.
J. Pietilainen
L. Hall

**Klimata kaso**
B. Crisp
J. D. T. Murray
G. Harmide
B. Crisp
T. Bormann
F. Lorrain
J.S. Meyer
M. Kennedy
T. Kleemann
M. Fettes
B. Moon
A. Cox
A. Weber
L. Hall

# Universalaj Kongresoj de Esperanto

| N-ro | Jaro | Kongresloko | Aliĝis |
|---|---|---|---|
| 1 | 1905 | Boulogne-sur-Mer, Francio | 688 |
| 2 | 1906 | Genève, Svislando | 1200 |
| 3 | 1907 | Cambridge, Britio | 1317 |
| 4 | 1908 | Dresden, Germanio | 1500 |
| 5 | 1909 | Barcelona, Hispanio | 1287 |
| 6 | 1910 | Washington, Usono | 357 |
| 7 | 1911 | Antwerpen, Belgio | 1800 |
| 8 | 1912 | Kraków, Pollando | 1000 |
| 9 | 1913 | Bern, Svislando | 1203 |
| 10 | 1914 | Paris. (Ne okazis.) Aliĝis | 3739 |
| 11 | 1915 | San Francisco, Usono | 163 |
| 12 | 1920 | Den Haag, Nederlando | 408 |
| 13 | 1921 | Praha, Ĉeĥoslovakio | 2561 |
| 14 | 1922 | Helsinki, Finnlando | 850 |
| 15 | 1923 | Nürnberg, Germanio | 4963 |
| 16 | 1924 | Wien, Aŭstrio | 3400 |
| 17 | 1925 | Genève, Svislando | 953 |
| 18 | 1926 | Edinburgh, Britio | 960 |
| 19 | 1927 | Danzig | 905 |
| 20 | 1928 | Antwerpen, Belgio | 1494 |
| 21 | 1929 | Budapest, Hungario | 1200 |
| 22 | 1930 | Oxford, Britio | 1211 |
| 23 | 1931 | Kraków, Pollando | 900 |
| 24 | 1932 | Paris, Francio | 1650 |
| 25 | 1933 | Köln, Germanio | 950 |
| 26 | 1934 | Stockholm, Svedio | 2042 |
| 27 | 1935 | Roma, Italio | 1442 |
| 28 | 1936 | Wien, Aŭstrio | 854 |
| 29 | 1937 | Warszawa, Pollando | 1120 |
| 30 | 1938 | London, Britio | 1602 |
| 31 | 1939 | Bern, Svislando | 765 |
| 32 | 1947 | Bern, Svislando | 1370 |
| 33 | 1948 | Malmö, Svedio | 1761 |
| 34 | 1949 | Bournemouth, Britio | 1534 |
| 35 | 1950 | Paris, Francio | 2325 |
| 36 | 1951 | München, Germanio | 2040 |
| 37 | 1952 | Oslo, Norvegio | 1614 |
| 38 | 1953 | Zagreb, Jugoslavio | 1760 |
| 39 | 1954 | Haarlem, Nederlando | 2353 |
| 40 | 1955 | Bologna, Italio | 1687 |
| 41 | 1956 | København, Danio | 2200 |
| 42 | 1957 | Marseille, Francio | 1468 |
| 43 | 1958 | Mainz, Germanio | 2021 |
| 44 | 1959 | Warszawa, Pollando | 3256 |
| 45 | 1960 | Bruxelles/Brussel, Belgio | 1930 |
| 46 | 1961 | Harrogate, Britio | 1646 |
| 47 | 1962 | København, Danio | 1550 |
| 48 | 1963 | Sofia, Bulgario | 3472 |
| 49 | 1964 | Den Haag, Nederlando | 2512 |
| 50 | 1965 | Tôkyô, Japanio | 1710 |
| 51 | 1966 | Budapest, Hungario | 3975 |
| 52 | 1967 | (Tel Aviv) Rotterdam, Nederlando | 1265 |
| 53 | 1968 | Madrid, Hispanio | 1769 |
| 54 | 1969 | Helsinki, Finnlando | 1857 |
| 55 | 1970 | Wien, Aŭstrio | 1987 |
| 56 | 1971 | London, Britio | 2071 |
| 57 | 1972 | Portland, Usono | 923 |
| 58 | 1973 | Beograd, Jugoslavio | 1638 |
| 59 | 1974 | Hamburg, Germanio | 1651 |
| 60 | 1975 | København, Danio | 1227 |
| 61 | 1976 | Athina, Grekio | 1266 |
| 62 | 1977 | Reykjavík, Islando | 1199 |
| 63 | 1978 | Varna, Bulgario | 4414 |
| 64 | 1979 | Luzern, Svislando | 1630 |
| 65 | 1980 | Stockholm, Svedio | 1807 |
| 66 | 1981 | Brasília, Brazilo | 1749 |
| 67 | 1982 | Antwerpen, Belgio | 1899 |
| 68 | 1983 | Budapest, Hungario | 4834 |
| 69 | 1984 | Vancouver, Kanado | 802 |
| 70 | 1985 | Augsburg, Germanio | 2311 |
| 71 | 1986 | Beijing, Ĉinio | 2482 |
| 72 | 1987 | Warszawa, Pollando | 5946 |
| 73 | 1988 | Rotterdam, Nederlando | 2321 |
| 74 | 1989 | Brighton, Britio | 2280 |
| 75 | 1990 | La Habana, Kubo | 1617 |
| 76 | 1991 | Bergen, Norvegio | 2400 |
| 77 | 1992 | Wien, Aŭstrio | 3033 |
| 78 | 1993 | Valencia, Hispanio | 1863 |
| 79 | 1994 | Seoul, Korea Resp. | 1776 |
| 80 | 1995 | Tampere, Finnlando | 2443 |
| 81 | 1996 | Praha, Ĉeĥio | 2972 |
| 82 | 1997 | Adelaide, Aŭstralio | 1224 |
| 83 | 1998 | Montpellier, Francio | 3133 |
| 84 | 1999 | Berlin, Germanio | 2712 |
| 85 | 2000 | Tel Aviv, Israelo | 1212 |
| 86 | 2001 | Zagreb, Kroatio | 1691 |
| 87 | 2002 | Fortaleza, Brazilo | 1484 |
| 88 | 2003 | Göteborg, Svedio | 1791 |
| 89 | 2004 | Beijing, Ĉinio | 2031 |
| 90 | 2005 | Vilnius, Litovio | 2344 |
| 91 | 2006 | Firenze, Italio | 2209 |
| 92 | 2007 | Yokohama, Japanio | 1901 |
| 93 | 2008 | Rotterdam, Nederlando | 1845 |
| 94 | 2009 | Białystok, Pollando | 1860 |
| 95 | 2010 | La Habana, Kubo | 1002 |
| 96 | 2011 | København, Danio | 1458 |
| 97 | 2012 | Hà Nội, Vjetnamio | 866 |
| 98 | 2013 | Reykjavík, Islando | 1034 |
| 99 | 2014 | Buenos Aires, Argentino | 706 |
| 100 | 2015 | Lille, Francio | 2698 |
| 101 | 2016 | Nitra, Slovakio | 1252 |
| 102 | 2017 | Seoul, Korea Respubliko | 1173 |
| 103 | 2018 | Lisboa, Portugalio | 1567 |
| 104 | 2019 | Lahti, Finnlando. | 917 |
| 105 | 2020 | Montréal, Kanado (Ne okazis.) 1-a Virtuala Kongreso | 1860 |
| 106 | 2021 | Belfast, Nord-Irlando (Ne okazis.) 2-a Virtuala Kongreso | 1853 |
| 107 | 2022 | Montréal, Kanado | |
| 108 | 2023 | Torino, Italio | |

108-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

# TORINO 29.07-05.08.2023

# La Espero

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.






Partoprenantoj de la UK havas eblon akiri la IKU/SUS-libron kontraŭ la speciala prezo: 15 €. Demandu en la Libroservo!

# BOBELARTO DUM UK

efemera artgalerio
verksesioj
legosalonoj
premio-ceremonio de INK

Ĝuu la mondon de Bobelarto dum la Universala Kongreso!

BOBEL ARTO